
# EL POPOLA ĈINIO

V-19034/1976

1
1976
中国报道







Frua printempo ĉe Ligiang-rivero *(Lignogravurajo)* de Song Hianbang

# Rapidigi la disvolvon de produktado de agrikulturaj maŝinoj

Akvopumpiloj produktitaj de la Akvopumpila Fabriko de Vejhaj, kies produktokvanto en 1974 estis 13-oblo de tiu en 1965.






Traktoroj produktitaj de la Lajjang-a Traktora Fabriko

Jantaj-subprovinco de la ĉina Ŝandong-provinco atingis rimarkindan sukceson en disvolvo de produktado de agrikulturaj maŝinoj en siaj kondiĉoj.

Jantaj-subprovinco inkluzivas 15 guberniojn kaj 2 urbojn. Nun ĝi unuapaŝe konstruis kompare kompletajn lokajn industriojn servantajn al agrikulturo kun malgrandaj fabrikoj de fero kaj ŝtalo, kaj maŝinfarado kiel ĝiaj ĉefpartoj. La produktivo de movfortaj maŝinoj pliiĝis je 6.5-oblo kompare kun tiu de 1970. Ĉiu brigado de la tuta subprovinco meznombre havas movfortajn maŝinojn pli multajn je pli-ol-8-oblo kompare kun tiuj de 1965 antaŭ la granda kultura revolucio. 37% de la totala agro estas plugataj de maŝinoj. La tuta subprovinco fundamente meĥanizis aŭ duonmeĥanizis draŝadon, mueladon de greno kaj furaĝo, kaj prilaboradon de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, kaj ankaŭ oceanan fiŝadon.


La disvolviĝo de agrikultura meĥanizo akcelis agrikulturan kaj flankokupan produktadon de Jantaj-subprovinco. En 1970 la meznombra mua produktokvanto de greno en la subprovinco atingis 418 ĝinojn, kaj en 1974 jam 670 ĝinojn. Nun Jantaj jam fariĝis unu el la avangardaj regionoj en agrikultura disvolvo de la tuta lando.



Laboristoj ofte iras en la kamparon por ripari tie maŝinojn.



Malgranda ŝtala uzino en Jantaj







Jantaj-subprovinco meĥanizis sian oceanan fiŝadon. Jen angulo de Jantaj-haveno.



Dank' al la senĉesa disvolviĝo de agrikulturaj maŝinoj Jantaj-subprovinco akiris riĉan rikolton en sinsekvaj jaroj. Jen la draŝejo de Kianŝavan-brigado de Lajhi-gubernio

EL POPOLA ĈINIO 中国报道

N-ro 1 (210) 1976

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

*BILDPAĜOJ:*

(1) Nova fizionomio de mont-regiono de Longŝeng

(2) Filmo "La Pioniroj"

*KOVRILO:*

Paĝo 1: Elektado de traboj

Paĝo 2: Belaj kampoj

Paĝo 3: Frua printempo ĉe Li-giang-rivero (*ligna gravurajo*)

Paĝo 4: Elterigitaj objektoj en Turfan de Hingiang



## Enhavo

Retrorigardo al la Longa Marŝo . . . . . . . . . . 2

Ĉiam flirtu la standardo de la Ruĝa Armeo . . . . 10

Kial la ekonomio de Ĉinio progresas relative rapide kaj stabile? . . . . . . . . . . . . . . . . . 13

Nova aspekto de la vasta tero de Hujhian . . . . . 20

Kolora filmo "La Pioniroj" . . . . . . . . . . . 25

ANTIKVAJ FABLOJ: Sen la lipoj la dentoj estas atakataj de malvarmo . . . . . . . . . . . . . . 27

Aliflanko de la celebrado pri la konkero de Ŝanhajo kaj Nankino . . . . . . . . . . . . . . . . 28

Por pli alta kvalito de produktoj . . . . . . . . . 31

Feliĉa vivo de maljunuloj . . . . . . . . . . . . 34

AMIKECO: La tradicia farmacio de Pakistano en disvolviĝo . . . . . . . . . . . . . . . . . 38

HISTORIAJ KULTURAĴOJ: Historiaj kulturaĵoj elfositaj en Hingiang . . . . . . . . . . . . . . 39

HISTORIAJ RAKONTOJ: Venko de Himen Baŭ super la artifiko de riverdia edziĝo . . . . . . . . . . . 42

ĈINAJ NACIECOJ: La tataroj . . . . . . . . . . . 44

ESPERANTA ANGULO:

Ĉina Esperanto-Delegacio vizitis Vjetnamion . . . . . 45
Novzelanda esperantistino vizitis Ĉinion . . . . . . 45

INTER NI: Al la legantoj . . . . . . . . . . . . 46

KURANTAJ AFEROJ . . . . . . . . . . . . . . 46

LIU BOĈENG:

# Retrorigardo al la

EN la du tutaj jaroj de oktobro de 1934 ĝis oktobro de 1936, la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo faris, forlasinte la originajn bazojn, la mondskuan Longan Marŝon de 25,000 lioj. En la Longa Marŝo, la Ruĝa Armeo konkeris multajn pasejojn, perforte kaj rapide transpasis riverojn, venkis persekutantajn kaj obstrukcantajn malamikajn trupojn dekmilojn nombrantajn, transgrimpis nuboskrapajn neĝajn montegojn kaj trapasis senhoman stepon, manifestante per sia mita braveco en batalo kontraŭ malfacilegoj la senkompare obstinan vivipovon de la komunisma movado kaj ĉionvenkan batalan forton de la armeo sub la gvido de la Komunista Partio.

Sed kial necesis la Longa Marŝo? Kial la Ruĝa Armeo povis sukcese fari tiun grandan heroaĵon? Multe da sperto kaj lecionoj estas elĉerpindaj koncerne al tio.

## I

Post la Kvara Plena Sesio de la Sesa Centra Komitato de la Partio en januaro de 1931, komenciĝis la regado de la triafoja "maldekstra" oportunisma linio reprezentata de Vang Ming super la Partio en la periodo de la agrara revolucio (1927-1937). La partia kongreso de la Centra Bazo en novembro de 1931 kaj la Ningdu-a kunveno en oktobro de 1932 kalumniis, laŭ la erara programo de la Kvara Plena Sesio de la Sesa Centra Komitato, la ĝustan linion de kamarado Maŭ Zedong kiel "kulakan linion" kaj "ekstreme gravan eraron de konstanta dekstra oportunismo" kaj ŝanĝis la ĝustan gvidadon de la Partio kaj militaj aferoj en la Centra Bazo. En la komenco de 1933, la provizora centralo de la Partio translokiĝis en la Centran Bazon pro la serioza perdo suferita en la laboro sub la gvido de la erara linio en la blanka regiono, kaj tio pliapaŝe antaŭenpuŝis la eraran linion en la Centra Bazo kaj la najbaraj bazoj.

La "maldekstra" linio konfuzis la taskojn kaj la limojn de la historiaj stadioj de la demokratia revolucio kaj la socialisma revolucio kaj subjektive deziregis transsalti la demokratian revolucion, subtaksis la decidigan rolon de la kontraŭfeŭdisma batalo de la kamparanoj en la ĉina revolucio kaj proponis plenan oponadon kontraŭ la burĝaro kaj eĉ kontraŭ la supera tavolo de la etburĝaro. La triafoja "maldekstra" linio metis la oponadon kontraŭ la burĝaro kaj la oponadon kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo en saman lokon, tute neis la gravan ŝanĝiĝon en la enlanda politiko kaŭzitan de la japana agreso kaj eĉ asertis, ke la tiutempe aktiviĝintaj mezaj elementoj, kiuj havis kontraŭdiron kun la reakcia regado de Kuomintango, estas "la plej danĝeraj malamikoj". Ĝiaj subtenantoj ne komprenis la karakterizaĵojn de la duonkolonia kaj duonfeŭda socio de Ĉinio, ne komprenis, ke la burĝara demokratia revolucio de Ĉinio estas esence kamparana revolucio kaj ne komprenis la neekvilibrecon, zigzagecon kaj longdaŭrecon de la ĉina revolucio, kaj sekve subtaksis la gravecon de la milita batalo kaj precipe la kamparana gerila milito kaj la kamparaj bazoj kaj ili erare postulis, ke la Ruĝa Armeo kaptu centrajn urbojn.

Sed pro tio, ke la ĝusta strategia principo de kamarado Maŭ Zedong havis profundan influon en la Ruĝa Armeo, venkis la milito kontraŭ la kvara "ĉirkaŭekstermo" en printempo de 1933, kiam la erara linio de la provizora centralo de la Partio ankoraŭ ne estis tute efektivigita en la Ruĝa Armeo. Sed en la milito kontraŭ la kvina "ĉirkaŭekstermo" komencita en la fino de 1933 la ekstreme erara milita linio jam plene superregis. La Kvina Plena Sesio de la Sesa Centra Komitato de la Partio kunvokita en januaro de 1934 estis la kulmino en la disvolviĝo de la triafoja "maldekstra" linio. Tiam la subtenantoj de tiu linio erare opiniis, ke "la ĉina

# Longa Marŝo

*La aŭtoro kamarado Liu Boĉeng estas membro de la Politika Buroo de CK de KPĈ, vicprezidanto de la Komisiono de Militaj Aferoj de CK de KPĈ kaj vicprezidanto de la Tutlanda Popola Kongreso. Dum la Longa Marŝo li laboris kiel ĝenerala stabestro de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo.*

revolucia krizo jam eniris en novan akran periodon — situacio de rekta revolucio ekzistis en Ĉinio", kaj opiniis, ke la batalo kontraŭ la kvina "ĉirkaŭekstermo" "estas batalo por gajni la plenan venkon de la ĉina revolucio". La triafoja "maldekstra" linio formis kompletan sistemon ankaŭ en militaj aferoj. Koncerne al konstruado de la armeo, ĝi reduktis la tri taskojn de la Ruĝa Armeo (batalado, amasa laboro kaj produktado) al nura militado, postulis nekonvenan reguligon kaj oponis kontraŭ la pravaj gerileco kaj movadeco de la Ruĝa Armeo kiel "gerilismo"; kaj krome ĝi disvolvis formalismon en politikaj laboroj. Koncerne al militado, ĝi neis la fakton ke la malamiko estas forta dum ni malfortaj; ĝi postulis fari pozician militon kaj "regulan militon" nur per la ĉeffortaj trupoj; ĝi postulis rapidan militon en strategio kaj longdaŭran militon en kampanjo; ĝi postulis fari "atakon sur ĉiuj frontoj" kaj "baton per ambaŭ pugnoj"; ĝi oponis kontraŭ allogo de malamikoj profunde en nian terenon kaj rigardis necesan evakuon kiel "retiriĝ-fuĝismon"; ĝi postulis fiksan batalfronton kaj absolute koncentran komandon ktp. Unuvorte, ĝi neis gerilan kaj gerilecan movadan militon kaj ne komprenis la ĝustan popolan militon.

En la milito kontraŭ la kvina "ĉirkaŭekstermo", aventurismo en atako estis praktikita en la komenco. Kaj post la hazarda venko en la batalo ĉe Hjunkoŭ la "maldekstraj" oportunistoj prenis ĝin kiel ekzemplon por pravigi sin, metis trupojn en malamikan regionon kaj praktikis la eraran principon "defendi la landon ekstere de ĝi".


En tiu tempo okazis la Fugian-a Evento* kaj la malamiko devis movi trupojn orienten. Se tiam ni lerte aliancigus kun tiuj fortoj, kiuj oponis kontraŭ Ĉiang Kajŝek kaj volis reziston kontraŭ la japana agreso, kaj kune kun ili alfrontus la reakciularon de Ĉiang Kajŝek, tio povus ludi grandegan rolon en subtenado al la kreskanta enlanda demokratia postulo de rezistado kontraŭ la japana agreso; kaj krome ni povis profiti tiun ŝancon en militaj aferoj por ekstermi parton de la malamiko kaj frakasi la kvinan "ĉirkaŭekstermon". Sed la "maldekstraj" oportunistoj asertis, ke la mezaj elementoj estas la plej danĝeraj malamikoj de la ĉina revolucio kaj la bona ŝanco estis preterlasita. La malamiko detruis la popolan registaron de Fugian, sin returnis kaj denove peziĝis sur nian bazon.

En la batalo ĉe Guangĉang, la Ruĝa Armeo suferis tre grandan perdon. De post tio la "maldekstraj" oportunistoj praktikis konservativismon en defendo, proponis dividon de siaj fortoj por gardi ĉiujn lokojn kaj dronis en pasiveco povante iniciati neniun atakon, tiel ke la nombro de niaj soldatoj kaj la tereno pli kaj pli malgrandiĝis.

Fine, la "maldekstraj" oportunistoj rifuzis la ĝustan opinion de Prezidanto Maŭ turni la ĉefan forton de la Ruĝa Armeo al la ekstera linio, movi kaj ekstermi la malamikojn por defendi kaj plivastigi la revolucian bazon, kaj praktikis fuĝismon. En oktobro de 1934, ili subite decidis forlasi la Centran Bazon kaj haste translokiĝis, farinte nek profundan ideologian mobilizon inter la kadroj kaj amasoj, nek necesajn preparojn por transiĝi de pozicia milito al movada milito, kaj de apogo al la bazo al forlaso de la bazo kaj por longe militiri.

## II

En la komenco de la Longa Marŝo, la Ruĝa Armeo plue suferis grandajn perdojn pro la fuĝisma eraro de la "maldekstra" linio en militaj aferoj. Tiutempe, la Kvina Armegrupo de la Centra Ruĝa Armeo, post forlaso de la Centra Bazo, longe agis kiel ariero de la tuta armeo por protekti la ŝarĝobrutojn kaj provianton dum la marŝado al la okcidento laŭ la limoj inter




*Caj Ginŝeng, veterano de la Ruĝa Armeo parolas pri la granda historia signifo de Zunji-konferenco al iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo ĉe la kunvenejo de Zunji-konferenco.*

Guangdong, Guanghi kaj Hunan. La pli ol 80,000 homoj de la tuta armeo iris sur la montvojeto interpreme kaj tre pene, ofte povis transiri nur unu monton en unu nokto. Sed la malamikoj iris sur la ŝoseo tre rapide kaj ni neniel povis liberiĝi de ilia persekutado.

Post kiam ni trarompis tri blokadliniojn de la malamiko per energia batalado, Ĉiang Kajŝek haste sendis 400,000 soldatojn en tri kolonoj por bari kaj persekuti la Ruĝan Armeon, kun la intenco ĝin ekstermi apud Hianggiang-rivero inter Hunan kaj Guanghi.

Fronte al la multego da malamikaj trupoj, la gvidantoj de la "maldekstra" linio fariĝis ankoraŭ pli senrimedaj, ili nur ordonis la trupojn ataki kaj batali sentaktike por trarompi la sieĝon kaj metis sian esperon sur kuniĝo kun la Dua kaj Sesa Armegrupoj. La armeo intense batalis tutan semajnon sude de Kjuan-gubernio en la nordorienta parto de Guanghi sur la orienta bordo de Hianggiang-rivero kaj eĉ formis koridoron per grandnombraj trupoj por ŝirmi la trapasantojn. Kvankam la Ruĝa Armeo sukcesis trarompi la kvaran blokadlinion de la malamiko kaj transpasi Hianggiang-riveron, tamen ĝi pagis terure multe por tio kaj perdis pli ol duonon de siaj homoj.

Vidinte la sinsekvajn malvenkojn ekde la milito kontraŭ la kvina "ĉirkaŭekstermo" kaj la trafitan senelirejon, la kadroj iom post iom konsciis, komparante tion kun la stato antaŭ la milito kontraŭ la kvara "ĉirkaŭekstermo", ke tio rezultiĝis el forpuŝo de la ĝusta linio reprezentata de kamarado Maŭ Zedong kaj el praktiko de la erara linio. En la trupoj evidente kreskis dubo, malkontentiĝo kaj postulo de ŝanĝo de la gvidantoj. Tia animstato fariĝis pli kaj pli klare rimarkebla kun la fiaskoj de nia armeo kaj atingis la kulminon en la kampanjo ĉe Hianggiang-rivero.

Por kunagi kun la Centra Ruĝa Armeo, tiutempe la Dua kaj Sesa Armegrupoj komencis fortan ofensivon sur la limoj inter Siĉuan, Gujĝoŭ kaj Hunan. Por malhelpi la kuniĝon de niaj trupoj, Ĉiang Kajŝek haste ekspedis multajn trupojn por blokadi kaj persekuti nin. Se ni ne forlasus la antaŭan intencon, ni devus fari decidan batalon kontraŭ malamikaj trupoj sesoble pli multaj ol la niaj. Tiam la batala forto de niaj trupoj senprecedence malgrandiĝis, kaj se ni rekte kontraŭstarus sentaktike kiel antaŭe la malamikon kun supera forto, ni pereus.

Ĝuste en tiu kriza momento, Prezidanto Maŭ savis la Ruĝan Armeon. Li energie proponis forlasi la intencon de kuniĝo kun la Dua kaj Sesa Armegrupoj, kaj anstataŭe marŝi al Gujĝoŭ malforte gardata de la malamiko por akiri iniciativon kaj gajni kelkajn batalojn, por ke niaj

trupoj povu iom ripozi kaj sin ordigi. Lian proponon subtenis la plejparto de la kamaradoj. Kaj post kiam nia armeo konkeris la urbon Tongdaŭ ĉe la sudokcidenta limo de Hunan, ĝi tuj marŝis al Gujĝoŭ kaj konkeris la urbon Liping en la sudorienta parto de Gujĝoŭ per unu batalo. Se tiam Prezidanto Maŭ ne persiste proponus ŝanĝi la orientilon, niaj restantaj pli ol tridek mil armeanoj povus trafi nur pereon.

La Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio kunvenis en Liping kaj decidis marŝi plue al Gujĝoŭ, kie la gardo de la malamiko estis relative malforta. Post ordigo en Liping, la trupoj tuj ekmarŝis, perforte transiris la riveron Vugiang en januaro de 1935 kaj konkeris la urbon Zunji en la norda parto de Gujĝoŭ. Kvankam en tiu tempo la trupoj vivis same streĉan vivon de marŝado kaj batalado, tamen ili pli kaj pli vigliĝis pro la sinsekvaj venkoj gajnitaj dank' al la saĝa ideo de Prezidanto Maŭ.

La armeo ripozis kaj sin ordigis 12 tagojn en Zunji kaj en tiu tempo la Centra Komitato de la Partio kunvokis plivastigitan konferencon de la Politika Buroo.


## III

La konferenco de Zunji koncentris sian forton al korektado de la eraroj en militaj aferoj kaj organizado kiuj ludis decidan rolon. La gvidantoj de la "maldekstra" linio intencis anstataŭigi gerilon kaj movadan militon per pozicia milito kaj popolan militon per la t. n. "regula" milito. Tiu erara milita linio decidis la malvenkon de la milito kontraŭ la kvina "ĉirkaŭekstermo" kaj kaŭzis seriozan perdon en la komenca periodo de la Longa Marŝo.

Tiu konferenco metis la finon al la regado de la "maldekstra" linio en la Centra Komitato de la Partio, komencis la novan gvidadon de la Centra Komitato kun kamarado Maŭ Zedong kiel la ĉefo kaj savis la Partion kaj la Ruĝan Armeon en la kriza momento. Tio estis turniĝo kun treege granda historia signifo, dank' al kiu nia Partio povis venke fari la Longan Marŝon, konservi kaj hardi la kadrojn de la Partio kaj la Ruĝa Armeo en la malfacilegaj kondiĉoj de la Longa Marŝo, venkis la fuĝisman linion de Ĝang Guotaŭ kaj lian intrigon de splitigo de la Partio, venke atingis nordan Ŝenhi, akcelis la fondon de la Kontraŭjapana Nacia Unueca Fronto kaj venigis la altan tajdon de rezisto kontraŭ la japana agreso.

Kiam la ĉefa enhavo de la konferenco de Zunji estis diskonigita al la trupoj, ĉiuj vigliĝis kvazaŭ ili ekvidus la sunon post forblovo de peza nebulo, tute malaperis la duboj kaj malkontentiĝoj. Post dekkelktaga ripozo la armeanoj iom refreŝiĝis kaj tuj komencis marŝon al la nordo post ordigado.

Dume, la Dua kaj Sesa Armegrupoj multe disvolviĝis en la limregiono de Hunan, Hubej, Siĉuan kaj Gujĝoŭ, sed pro tio ke malamikaj trupoj staris en Ĝigiang kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj en la okcidenta parto de Hunan por bari nian armeon reveni al Hunan, ni ne povis interrilatiĝi kun ili. Kaj la Kvara-fronta Armeo de la bazo de Siĉuan kaj Ŝenhi frakasis la seskolonan sieĝadon de militaristo de Siĉuan. Kiam la Centra Ruĝa Armeo marŝis norden tra Tongzi kaj Hiŝuj norde de Zunji kaj transpasis Ĉiŝuj-riveron, la malamiko tuj konsterniĝis. Siĉuan-a militaristo haste sendis trupojn al la limo inter Siĉuan kaj Gujĝoŭ por gardado kaj ekspedis sian modelan divizion sub la komando de Guo Hjunki por patroladi kaj blokadi Jangzi-riveron, kun la intenco bari niajn trupojn transpasi norden la riveron kaj kuniĝi kun la Kvara-fronta Armeo. Kiam niaj trupoj atingis Vejhin en la nordorienta parto de Junnan, la malamikaj kolonoj de Ĝoŭ Hunjuan kaj Vu Kivej jam alrapidis de Hunan. En la batalo ĉe Tuĉeng, ni ne povis ekstermi la divizion de Guo kaj la trupoj de la malamiko rapide kolektiĝis. Ni do forlasis la planon marŝi norden kaj transpasi Jangziriveron, subite forrapidis de la malamiko, iris orienten, refoje transpasis Ĉiŝuj-riveron, denove okupis Tongzi, Loŭŝanguan-pasejon kaj Zunji kaj ekstermis du diviziojn de Gujĝoŭ-a militaristo Vang Gialie. Tiam la kolonoj de Ĝoŭ kaj Vu jam kuratingis nin kaj komencis intense batali kun nia armeo. Pluvegis, la montvojoj estis kotaj kaj glitigaj. Niaj Tria Armegrupo kaj la Kadra Regimento bataladis kun la malamiko por kapti la altan punkton de Laŭjamonto. La Unua Armegrupo penetris de la ok-



*Parto de la Unuafronta Armeo de la Ruĝa Armeo alveninta al norda Ŝenhi post la Longa Marŝo*

cidenta flanko en la trupojn de la malamiko sub la ŝirmo de la nokta mallumo. Aŭdiĝis klarionado en ĉiuj flankoj, kiun laŭte eĥis la montoj, la ambaŭflanke atakataj malamikoj tuj konfuziĝis kaj fuĝis suden en paniko. Niaj trupoj persekutadis ilin ĝis la bordo de Vugiang-rivero kaj ekstermis pli ol unu divizion de la malamiko. La restantaj malamikaj trupoj transpasis Vugiang por forfuĝi suden kaj malkonstruis la flosponton sur ĝi, timante ke ni persekutos ilin, kaj la malamikaj armeanoj, kiuj ne sukcesis transpasi la riveron, estis ekstermitaj. Tiu estis nia unua granda venko gajnita post la komenco de la Longa Marŝo.


Post la konferenco de Zunji nia armeo tute ŝanĝiĝis, kvazaŭ akirus novan vivon. Manovrante zigzage inter la malamikaj trupoj kiel vigla tigro, ni movadis ilin — kiam ili konjektis ke ni iros orienten, ni marŝis okcidenten, kiam ili pensis, ke ni transpasos Jangzi-riveron por marŝi norden, ni returnis nin por rebati malamikan trupon. Por ĉiu manovro de nia armeo, la malamiko devis rearanĝi la lokitajn trupojn, dank' al kio ni povis bone ripozi, mobilizi la amasojn kaj pligrandigi la Ruĝan Armeon. Apenaŭ la malamiko plenumis la rearanĝon niaj trupoj tamen jam militiris aliloken. La malamiko konfuziĝis, ĉie ricevis batojn kaj fariĝis lacegaj de kurado. Komparante tion kun la stato dum la regado de la "maldekstra" linio, la komandantoj kaj batalantoj de la tuta armeo pli klare vidis, ke la ĝusta linio de Prezidanto Maŭ kaj lia alte disvolvita marksisma milita arto estas la unika garantio por nevenkebleco de nia armeo.

Nia armeo plurfoje serĉis ŝancon por ataki la malamikon en la ĉirkaŭaĵo de Zunji, sed la lasta nur zorge sin gardadis. En marto, nia armeo ekmarŝis okcidenten for de Zunji, okupis Ĵenhuaj, triafoje transpasis Ĉiŝuj-riveron ĉe Maŭtaj kaj reiris en la sudan parton de Siĉuan. Konjektante ke niaj trupoj marŝos norden por transpasi Jangzi-riveron, la malamiko teruriĝis, tuj streĉe konstruis fortikaĵojn sur la limoj inter Siĉuan, Gujĝoŭ kaj Junnan kun la intenco blokadi kaj ĉirkaŭekstermi nian armeon. Sed nia armeo subite sin turnis de suda Siĉuan en Gujĝoŭ, kvarafoje transpasis Ĉiŝuj-riveron ĉe Maŭtaj, rapide marŝis tra Fenghiangba, restigante nur malgrandan trupon por bari la malamikon, transpasis Vugiang, rekte sin puŝis al Gujjang kaj atakis Veng-an kaj Huangping per parto de siaj trupoj.

Tiam Ĉiang Kajŝek veturis al Gujjang por persone komandi la batalantan malamikan armeon, haste venigis trupojn de Junnan-a militaristo por lin defendi, kaj samtempe ordonis Hjue Jue kaj la trupojn de Hunan-provinco rapidi al Juking, Ŝikian k.a. en la orienta parto de Gujĝoŭ, por ke nia armeo ne povu marŝi orienten kaj kuniĝi kun la Dua kaj Sesa Armegrupoj. Tiam Prezidanto Maŭ antaŭdiris: "Se nur la malamikaj trupoj de Junnan estos ellogitaj eksteren, tio jam signifos venkon por ni." Kaj vere la malamiko agis tute laŭ la komando de Prezidanto Maŭ. Tiam ni sieĝis Longli sudoriente de Gujjang per unu armegrupo por mistifiki la malamikon per la ŝajnigo, kaj nia ĉefa forto transpasis la Hunan-Gujĝoŭ-an Ŝoseon kaj

rekte sin puŝis al Junnan, en direkto kontraŭa al tiu de la Junnan-aj malamikaj trupoj rapidantaj al Gujjang por helpo. Ĉifoje, Prezidanto Maŭ sukcese aplikis la refleksebIan taktikon "ŝajnigante atakon en la oriento ataki en la okcidento", erarigis la malamikon per ŝajna atako oriente de Gujjang, tiel ke nia armeo akiris ŝancon por subite sin puŝi okcidenten.


Transpasinte la ŝoseon kaj forskuinte la malamikajn trupojn, nia armeo marŝis rapidege, kvazaŭ ricevus flugilojn kaj iris 60 kilometrojn en unu tago. Survoje, ni konkeris Dingfan (nun Hujŝuj), Guangŝun, Hingji k.a. guberniojn en la sudokcidenta parto de Gujĝoŭ, kaj transpasis la riveron Bejpan. En la lasta tagdeko de aprilo, nia armeo marŝis en tri kolonoj al la orienta parto de Junnan: Unu kolono konsistis el la Naŭa Armegrupo asignita por speciale kroĉi la malamikojn norde de Vugiang, kiu venkis kvin persekutantajn malamikajn regimentojn, konkeris Hjuanvej post eniro al Junnan kaj poste trairis Hujze kaj transpasis Ginŝa-riveron; la aliaj du kolonoj de la ĉefa forto de la Ruĝa Armeo konkeris Ĝanji, Malong, Hjundian, Songming k.a. kaj rekte puŝiĝis al Kunming. Tiam la ĉefa forto de la Junnan-a armeo jam estis tute ekspedita orienten kaj Junnan fariĝis sengarda. Kiam niaj trupoj eniris en Junnan, tiea militaristo Long Jun ektimegis, haste kolektis lokajn armitajn trupojn por gardi Kunming, sed farante



*Parto de la Duafronta Armeo de la Ruĝa Armeo alveninta al norda Ŝenhi post la Longa Marŝo*



*Parto de la Kvarafronta Armeo de la Ruĝa Armeo alveninta al norda Ŝenhi post la Longa Marŝo*



*Parto de la 15-a Armegrupo de la Ruĝa Armeo*


finton nia armeo tuj puŝiĝis nordokcidenten al Ginŝa-rivero.

La larĝa Ginŝa-rivero torentanta en la profunda kanjono laŭ la limo inter Siĉuan kaj Junnan formis terenon malfacile trapaseblan. Se nia armeo ne povus ĝin transpasi, ni estus ŝlositaj kaj ekstermitaj de malamikaj trupoj en la ravino. En tiu tempo, verŝajne Ĉiang Kajŝek jam rimarkis nian spuron kaj ĉiutage elsendis aeroplanojn por rekognosko. Nia armeo marŝis tagnokte en tri paralelaj kolonoj al Ginŝa-rivero: La Unua Armegrupo iris kapti la pramejon Longgiedu, la Tria Armegrupo la pramejon Hongmendu, la Kadra Regimento la pramejon Giaŭĉedu kaj la Kvina Armegrupo agis ankoraŭ kiel ariero.

La Kadra Regimento ŝtele transpasis Ginŝa-riveron, surprize atakis kaj ekstermis la gardantan plotonon de la Siĉuan-a armeo, tuj kaptis la pramejojn ĉe ambaŭ bordoj de Giaŭĉedu kaj trovis 7 boatojn. La ĉefa forto de la regimento rapidis laŭ la norda bordo en la ravino al la altebenaĵo je dekoj da kilometroj fore kaj disbatis la Siĉuan-an helpan trupon. Ĉar la rivero ĉe Hongmendu-pramejo estis netranspasebla pro la tro rapida torento, kaj ĝi estis tro larĝa ĉe Longgiedu, kie malamika aeroplano povis flugi malalte por malhelpi, do ankaŭ tiu loko ne konvenis por transpaso, tial la Unua kaj Tria Armegrupoj ĉiuj iris al Giaŭĉedu por transpasi la riveron kaj unu divizio de la Kvina Armegrupo plue agis kiel ariero.

Tri tagojn poste, ĉ. 6 regimentoj de la riska trupo la Dektria Divizio de la malamiko alkuris al Giaŭĉedu, ricevis neatenditan baton de nia Kvina Armegrupo kaj retiriĝis laŭ la rivero. Tiam Ĉiang Kajŝek rimarkis, ke ŝanĝiĝis la taktika principo de nia armeo, kaj okazigis kunvenon en Gujjang por studi la karakterizaĵon de nia lastatempa militado, difinis la taktikan principon "longe persekuti kaj senriske ataki", por ne esti ekstermita de nia armeo. Vidante ke ĝi estas tre malproksime de la ĉefa forto, la persekutata Dektria Divizio de la malamiko firme sin gardis en Tuangie kaj ne kuraĝis eliri, ne konante la veran staton de niaj fortoj. Kaj niaj trupoj transpasis unuj post aliaj Giaŭĉedu per la 7 boatoj en 9 diurnoj. Kiam la ĉefaj trupoj de la malamiko alrapidis en la sekvanta tago post kiam la Ruĝa Armeo finis la transpasadon de la rivero, la boatoj jam estis forbruligitaj kaj la Ruĝa Armeo jam marŝis for.

De tiam nia armeo sin liberigis de la persekutado kaj blokado de centmiloj da malamikaj armeanoj kaj gajnis venkon kun decida signifo por la strategia translokiĝo. Ripozinte 5 tagojn en Hujli en sudokcidenta Siĉuan, niaj trupoj marŝis plu norden. Ni iris tra Hiĉang kaj Lugu kaj eniris en regionon koncentre loĝatan de jinaciecaj gefratoj. Ni rezolute plenumis la nacian politikon de Prezidanto Maŭ kaj amike interligiĝis kun la ĉefo de Guĝi-tribo, neŭtraligis Laŭvu-tribon kaj ripetade klarigis al Luohong-tribo, kiu de tempo al tempo surprizis nin instigate de Ĉiangkajŝek-aj spionoj, ke nia armeo venas por helpi la nacimalplimultojn en ilia liberiga movado. Kaj dank' al la nacia politiko de la Partio ni glate trairis la ji-naciecan regionon kaj venis al la pramejo de Anŝunĉang en Ŝimian-gubernio.



*Nova fervoja ponto super Ginŝa-rivero, kiun la Ruĝa Armeo transpasis siatempe en la Longa Marŝo.*


Anŝunĉang antaŭe estis nomata Ĝidadi, kie la trupoj de Ŝi Dakaj** de la revolucia movado de la Tajping-a Ĉiela Regno (1851-1864 p.K.) ne povis transiri la riveron por marŝi norden kaj malvenkis finfine. Tiu pramejo troviĝis en profunda valo kun altaj montoj etendiĝantaj ĉ. 50 liojn ĉe ambaŭ flankoj. En tia loko la trupoj ne povis fari manovron nek sterni siajn fortojn por batalo kaj estis facile ekstermeblaj pro embusko. Tial militaristo de Siĉuan proklamis, ke la Ruĝa Armeo ripetos tie la malvenkon de Ŝi Dakaj. Ĉe Anŝunĉang sur la suda bordo gardis bataliono de Siĉuan-a militaristo, kiu tiris ĉiujn boatojn al la norda bordo, restigante unu boaton por komunikado. Sieĝante la malamikojn ĉe Anŝunĉang ni trovis la boaton kaj organizis sturman taĉmenton por transpasi la riveron. Transpasinte la riveron, niaj 17 bravuloj tuj frakasis la malamikajn armeanojn kaj okupis la pramejon. Tuj poste, nia Unua Divizio transpasis la riveron, likvidis la malamikojn laŭlonge de la norda bordo kaj disbatis la rezervan brigadon de la Siĉuan-a militaristo Liu Venhuj sur la norda bordo. Kaj tuj sekve la Unua Divizio kaj la Dua Divizio marŝis samtempe laŭ ambaŭ bordoj de la rivero al la ferĉena ponto de Luding. La Dua Divizio atingis la lokon pli frue kaj antaŭ ol la malamikoj tute detruis la ponton, niaj trupoj jam sturmis trans Dadu-riveron tra la ferĉena ponto kaj kuniĝis kun la Unua Divizio.

En junio de 1935, post transpaso de Dadu-rivero la Ruĝa Armeo faris batalon ĉe Hanjuan kaj frakasis 4 regimentojn de Siĉuan-a militaristo. Kaj poste ĝi iris tra Tiankjuan, Luŝan kaj Baŭhing en okcidenta Siĉuan, transgrimpis la unuan neĝkovratan montegon en la Longa Marŝo, nome Giagin-monton, okupis Davej, Maŭgong kaj aliajn lokojn de nordokcidenta Siĉuan kaj venke kuniĝis kun la Kvara-fronta Armeo.

---

* *Pro la agresado de la japana imperiismo al Ĉinio, la gvidantoj de la Deknaŭavoja Armeo de Kuomintango garnizonanta en Fugian-provinco iom post iom konsciiĝis, sub la forta influo de la kontraŭjapana postulo de la tuta popolo, ke la militado kontraŭ la Ruĝa Armeo ne havas elirejon, kaj alianciĝinte kun parto de la fortoj de Kuomintango deklaris rompon kun Ĉiang Kajŝek en novembro de 1933, fondis la Popolan Revolucian Registaron de la Ĉina Respubliko kaj subskribis interkonsenton kun la Ruĝa Armeo por kune oponi kontraŭ Japanio kaj Ĉiang Kajŝek. Tiu evento estas nomata la Fugian-a Evento.*

** *La Tajping-a Ĉiela Regno estas regpotenco fondita en la grandioza kamparana revolucia milito de nia lando en la mezo de la 19-a jarcento. Ŝi Dakaj (1831-1863) estas unu el la ĉefaj komandantoj de la Tajping-a Ĉiela Regno. Pro konflikto en la gvidantaro, li arbitre forkondukis siajn trupojn disde la ĉefa forto de la Tajping-a Ĉiela Regno, solece faris batalon en diversaj lokoj kaj pereis kun siaj trupoj ĉe Dadu-rivero en 1863.*




de **HIANG HONG**

LA helbrila standardo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo estas simbolo de batalo, solidareco kaj venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Sennombraj revoluciaj batalantoj iris grupojn post grupoj en la trupojn de la Ruĝa Armeo, transprenis ĝian standardon kaj brave marŝas antaŭen sur la vojo de daŭra revolucio. Ĉi tie mi prezentu al vi notojn pri disvolvo de la glora tradicio de la Ruĝa Armeo fare de kelkaj kompanioj de la Ruĝa Armeo en la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

## I

La Dadu-rivera Kompanio de la Kantonaj Trupoj estas kompanio, kiu plenumis, en la Longa Marŝo, la taskon de pionira trupo por perforte transpasi Dadu-riveron. 17 bravuloj de tiu kompanio sukcese transpasis siatempe la naturan barajon, tra pluvo de kugloj kaj furiozaj ondegoj. Hodiaŭ la nova generacio de batalantoj de la Dadu-rivera Kompanio heredis kaj disvolvas la gloran revolucian tradicion de la Ruĝa Armeo kaj same montris sentimecon en plenumado de diversaj taskoj de preparado kontraŭ milito.

Foje la kompanio ricevis taskon de nacidefenda konstruado kaj la komandantoj kaj batalantoj tuj forlasis la kazernon kaj marŝis en montaron. La montoj estas altaj kaj la materialo-portantaj kamionoj ne povis iri supren sur la kruta vojo. La batalantoj do ŝultre portis la betonajn brikojn pezantajn po pli ol 30 kg. al la loko je 800 m. alta ĉe la monttalio. Grava disfalo de terajo okazis en la tunelo kaj tio malhelpis la konstruadon. Veteranaj soldatoj tuj organizis sin en sturman taĉmenton kaj riske plenumis urĝan savon tagnokte, same kiel la 17 bravuloj de la Ruĝa Armeo siatempe faris en perforta transpaso de Dadu-rivero. Post dekkelktaga klopodo, ili venkis la malfacilojn kaj plenumis la konstruan taskon antaŭdate.

La junaj komandantoj kaj batalantoj de la Dadu-rivera Kompanio montris sentiman revolucian spiriton ankaŭ en trejnado. En ekzercado de grenadjeto multaj soldatoj tiel fortostreĉis, ke iliaj brakoj ŝveliĝis, en ekzercado de pafado, iliaj kubutoj kaj genuoj frotvundiĝis, en ekzercado de batalo per bajoneto, ili pikis centfoje en unu spiro, sed ili havis nenian plendon pri doloro kaj laciĝo. Dum ekzercado de trans-

naĝado de rivero kun armiloj en la pasinta jaro, pluvegadis kaj la temperaturo abrupte falis. Nur kelkajn minutojn post enakviĝo la lipoj de la naĝantoj jam bluiĝis kaj la dentoj ekklakadis. Sed nek pluvego nek malvarmo povis malhelpi ilian ekzercadon de naĝado. La pluvo daŭris 9 tagojn kaj ili sin ekzercis 9 tagojn en akvo. Dank' al la senlaca ekzercado altiĝis ilia naĝarto kaj ĉiuj soldatoj de la kompanio fariĝis bravuloj de transnaĝo de rivero kun armiloj.

En julio de la pasinta jaro, la Dadu-rivera Kompanio faris trejnadon de somera kampado. Anstataŭ iri ebenan vojon la komandantoj kaj batalantoj transgrimpis montegon, kaj anstataŭ tranokti en domoj, ili loĝis en tendoj. Ili faris surprizan atakon en nokta pluvego kaj sin ekzercis pri persekutado en arda suno. Iuvespere, tuj post kunarmila transnaĝo de mil-metra rivero, la komandantoj kaj batalantoj de la kompanio ricevis ordonon, ke ili tuj rapidu al iu loko por plenumi novan taskon. Nek preninte manĝon, nek ŝanĝinte siajn malsekajn vestojn, ili rapide marŝis en nokto pli ol 30 kilometrojn kun la batala stilo de kontinua batalado kaj maltimo al laco kaj akurate atingis la cellokon.

## II

Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la Ruĝa Armeo batalis siatempe en solidareco kaj akiris venkojn unu post alia dum la malfacila Longa Marŝo.

La Modela Kompanio en Perforta Transpaso de Vugiang-rivero estis avangardo de la Ruĝa Kvara Regimento "Pioniro" en la Longa Marŝo. Dum la Longa Marŝo, en tiu kompanio jam regis plena harmonio. Tiam la Ruĝa Armeo vivis tre malfacile kaj ofte prenis arboŝelojn kaj herboradikojn kiel manĝaĵojn. La kadroj de la kompanio ofte cedis sian grenporcion al soldatoj kaj malsanuloj. Se soldatoj vundiĝis en batalo, kadroj ilin portis surdorse dum marŝado. Kaj dank' al la plena unuiĝo, la kompanio fariĝis ĉiamvenka. En la batalo de perforta transpaso de Vugiang-rivero, la komandantoj kaj batalantoj de tiu kompanio sturmis la kontraŭan bordon per bambuaj flosoj malgraŭ la kanonado de la malamiko kaj okupis ĝian pozicion. Pro tio ĝi estis honore titolita Modela Kompanio en Perforta Transpaso de Vugiang-rivero. En la batalo por kapti la gravan pasejon Lazikoŭ, ili bone kunagis kun frataj kompanioj, transpasis la torentan profundan riveron, transgrimpis krutan rokmuron helpe de kunligitaj surobendoj, konkeris la pasejon kaj malfermis vojon por la antaŭenmarŝo de la Ruĝa Armeo. Hodiaŭ la komandantoj kaj batalantoj de la Modela Kompanio en Perforta Transpaso de Vugiang-rivero de la Vuhan-aj Trupoj rememoris tiun brilan batalan historion kaj estis profunde afekciitaj. Ili diris: "La historio de la Longa Marŝo konigis al ni, ke sin organizinte en solida batala kolektivo, la klasaj fratoj de ĉiuj partoj de la lando kolektiĝintaj por unu sama revolucia celo povas fariĝi nebarebla revolucia torento."

En la pasintaj dekoj da jaroj, la glora tradicio de la Ruĝa Armeo en la Longa Marŝo estis heredata de generacio al generacio en tiu heroa kompanio. Ĝuste dank' al la forta solidareco ĝi atingis rimarkindan sukceson kaj gajnis la honoran standardon de "plenampleksa venko" en plenumado de la tasko de defendo kaj konstruado de Hajnan-insulo; en la Granda Proleta Kultura Revolucio, ĝiaj membroj estis dissenditaj al iuj provincoj kaj urboj por plenumi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj ĝi estis elektita de la supera partia komitato kiel modela kompanio de solidareco en batalo. Post studado de la teorio pri la diktaturo de la proletaro, la komandantoj kaj batalantoj de la kompanio ankoraŭ pli konscience unuiĝis en batalado por defendi la patrolandon kaj plifirmigi la diktaturon de la proletaro. Ĉu en trejna marŝado, ĉu en plenumo de malfacila tasko, la kadroj kaj batalantoj ĉiam zorgas kaj helpas unu alian.

Foje en ekzerca manovrado ĉiuj de la kompanio tre laciĝis post tuttaga marŝado, sed la politika vicdirektanto Li Gan ellitiĝis en profunda nokto kaj iris al la tranoktaj punktoj de la plotonoj por fari kontrolon kiel kutime. En la tranoktejo de la kuira subplotono li vidis, ke soldato Li Kunling turniĝadis en sia lito kaj ne povis endormiĝi. Li do sidiĝis sur la rando de lia lito kaj demandis pri lia farto. Informiĝinte ke lia stomaka malsano denove turmentas lin,


Li Gan tuj boligis akvon por ke li prenu medikamenton. Li bone flegis la soldaton dum dutaga ripozo kaj dank' al lia zorgo la soldato rapide resaniĝis.

### III

Dum la Longa Marŝo antaŭ 40 jaroj, la Ruĝa Armeo modele observis la disciplinojn rilate al la amasoj kaj la nacian politikon de la Partio, ĉiam prizorgis la interesojn kaj malfacilojn de la popolo kaj starigis intimajn rilatojn kun ĝi. Tio vivece pruvis, ke **"firme stari kun la ĉina popolo kaj tutkore, plenanime servi al la ĉina popolo estas la sola celo de tiu ĉi armeo".** Hodiaŭ la Ruĝa Unua Kompanio de la Pekina Garnizono pliapaŝe disvolvis tiun gloran tradicion.

La Ruĝa Unua Kompanio estis la pionira kompanio en la transpaso de Vugiang-rivero dum la Longa Marŝo. Veninte al la bordo de Vugiang, ili unuflanke faris preparon por batalo, kaj aliflanke ĉiamaniere helpis la popolanojn, malgraŭ laciĝo post longdaŭra irado. En pluvego ili konstruis pajlkabanojn sur ruino, revenigis popolanojn forfuĝintajn pro la kruela ago de la reakcia kuomintanga armeo kaj disdonis al ili ĉiom da greno kaj vestoj kiom la kompanio havis. Kaj la loĝantoj sur la bordo havigis al la kompanio informojn pri la malamiko riskante la vivon, faris bambuajn flosojn kaj serĉadis boatojn kune kun la ruĝarmeanoj por transpasi la riveron. Subtenate kaj helpate de la popolamasoj, la Ruĝa Unua Kompanio venke plenumis sian taskon kaj malfermis vojon por la sekvantaj trupoj. Hodiaŭ la komandantoj kaj batalantoj de la kompanio same kiel la antaŭa Ruĝa Armeo respektas kaj amas la popolon. En la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj studo de la teorio pri la diktaturo de la proletaro, la kompanio ofte sendis propagandajn grupojn al najbaraj komunumoj kaj brigadoj por studi revolucian teorion kune kun la komunumanoj kaj propagandi la linion, principojn kaj politikojn de la Partio. Por helpi komunumojn kaj brigadojn de la loko, kie la kompanio garnizonis, en lernado de revolucia teorio, ili ne nur donacis al ili verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin, verkojn de Prezidanto Maŭ kaj aliajn librojn, sed ankaŭ sendis siajn avangardulojn en teoria studo en ĉirkaŭajn vilaĝojn por ke ili studu kaj faru kritikadon kune kun la komunumanoj, helpu ilin en eldono de murgazetoj kaj nigratabulaj gazetoj kaj kulturu por ili teoriajn kadrojn. Kaj krome, la kompanio ankaŭ helpis la komunumojn kaj brigadojn de la garnizona loko en kulturado de miliciaj kadroj. Informiĝinte ke la brigado Guanhiĝuang, kiu estis malproksime de la garnizonejo, ne havis kadrojn por trejnado de milicio, la kompanio sendis al ĝi soldatojn lertajn en milita tekniko por ĉiutage studi, labori kaj fari militan ekzercon kune kun tieaj milicianoj en ĉia vetero. Post seninterrompa diligenta trejnado de unu monato, multe altiĝis la milita kvalito de la milicio de Guanhiĝuang kaj ĝi atingis bonegan sukceson en ekzameno de pafado.

En la komenco, kiam la kompanio kampadis en vilaĝo de Hebej, la komandantoj kaj batalantoj trovis, ke glacio ĉirkaŭ iu puto malfaciligis ĉerpadon de akvo, ili decidis reformi la puton por la komunumanoj de la vilaĝo, por disvolvi la gloran tradicion de la Ruĝa Armeo tutkore servi al la popolo. Malgraŭ frosto, ili alportis multajn ŝtonojn en liberaj horoj kaj ferioj, konstruis cirklan akvodrenilon, rekonstruis terason ĉirkaŭ la aperturo de la puto, faris kovrilon al ĝi. La kamparanoj de tiu loko dankeme nomis ĝin Puto de Amo al la Popolo. En la ferioj de la Nacia Festo de 1975 la kompanio informiĝis, ke maturiĝinta rizo en kampo de la kvara produkta brigado devas esti tuj falĉita. La komandantoj kaj batalantoj de la kompanio volonte oferis sian ripozon en la ferioj kaj finfalĉis la rizplantojn de pli ol 40 muoj (muo = 1/15 hektaro) da kampoj en du matenoj. Komunumanoj diris laŭde, ke ili vere meritas la nomon de bonaj posteuloj de la Ruĝa Armeo.



GJU HINHUA:

# Kial la ekonomio de Ĉinio progresas relative rapide kaj stabile?

Akre kontrastante kun la serioza ekonomia krizo en la kapitalisma mondo, la socialisma ekonomio de Ĉinio disvolviĝas senŝanceliĝe per relative grandaj paŝoj.


En la pasintaj 26 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la agrikultura produktado disvolviĝis rapide kaj abundaj rikoltoj en 13 sinsekvaj jaroj estis akiritaj en ĝi. La totala produktokvanto de greno en 1974 estis 2.4-oblo de tiu en 1949. La industrio progresas pli rapide kaj ĝia totala produktovaloro en 1974 estis preskaŭ 3-oblo de tiu de 1964. La produktokvantoj de la ĉefaj industriaj produktaĵoj grandiĝis rapide. Tiu de ŝtalo en 1974 estis 2.2-oblo de tiu en 1964, tiu de petrolo 7.6-oblo, tiu de karbo 1.92-oblo, tiu de elektroenergio 3-oblo, tiu de kemisterko 4.5-oblo, tiu de traktoroj 6.4-oblo kaj tiu de kotona ŝpinaĵo 1.86-oblo. La disvolviĝo de la nacia ekonomio de Ĉinio forte akcelis la socialisman konstruadon. Nia lando jam venke plenumis kvar kvinjarajn planojn de disvolvo de la nacia ekonomio.

Antaŭ 26 jaroj Ĉinio estis lando superregata de imperiismaj landoj en financo kaj ekonomio. Sed hodiaŭ la nova socialisma Ĉinio ŝuldas nek en nek ekster la lando kaj havas investon de neniu fremda lando. Kiam okazas serioza inflacio en la kapitalisma mondo, la valoro de la ĉina *jenminbi* restas stabila. Senĉese pliboniĝas la vivo de la popolo kaj ĉiuj laborkapablaj plenkreskuloj havas profesion. Pli kaj pli multiĝas la deponita ŝparmono de urbanoj kaj kamparanoj, kaj la sumo de 1974 kreskis je 12.5 pocentoj kompare kun tiu en 1973.

Hodiaŭ la ekonomio de Ĉinio prosperiĝas kun ĉiu tago. La ĉina ekonomio ŝuldas sian rapidan kaj stabilan disvolviĝon en la pasinta kvarona jarcento al la senŝanceliĝa observado de la principo "sendependeco, memdecido kaj sinapogo sur propraj fortoj" fare de la laboristaro kaj aliaj laboruloj de Ĉinio.

Ĉinio prenas agrikulturon kiel la bazon por disvolvi la nacian ekonomion kaj metas ĝin sur la unuan lokon. Ĉiujare la ŝtato disponigas grandan sumon da kapitalo por disvolvi agrikulturon. La bonega agrikultura produktado pretigis sufiĉan grenon, materialojn, merkaton kaj relative grandan kapitalon por la peza kaj malpeza industrioj. Sur la bazo de disvolviĝo de la agrikulturo ankaŭ la malpeza industrio progresas rapide. En la lastaj pli ol 20 jaroj la produktokvantoj de ĉefaj produktaĵoj de la malpeza industrio kreskis kelkoble aŭ kelkdekoble, kaj iliaj specoj atingis dekmilojn. La disvolviĝo de la malpeza industrio vigligis la merkaton kaj bone plenumis la bezonon de la popolo. La investo bezonata de la malpeza industrio estas relative malgranda, kaj ĝia kapitalo cirkulas rapide, tial la agrikulturo kaj la peza industrio povas akiri de ĝi pli multan kapitalon. Kaj la laŭplana disvolvo de la peza industrio liveras pli kaj pli multajn ekipaĵojn kaj aliajn produktajn rimedojn por agrikulturo, malpeza industrio, trafiko kaj peza industrio mem. En la lastaj pli ol 20 jaroj, kvan-


## Pliiĝo de Ĉina Ekonomio




kam ekonomiaj krizoj en la kapitalisma mondo okazis unu post alia, la ĉina ekonomio tamen progresis per firmaj viglaj paŝoj.


La ĉina ekonomio ŝuldas sian relative rapidan kaj stabilan progreson ankaŭ al la vasta stabila merkato en la lando. Tiu ĉi socialisma enlanda merkato havas grandan latentan forton kaj povas akcepti pli kaj pli multajn produktaĵojn de la peza kaj malpeza industrioj, tial ĝi pretigis grandan eblecon al la rapidega disvolviĝo de la nacia ekonomio. Laŭ la bezono de la konstruado kaj la popola vivo, la ŝtato laŭplane disvolvas ekonomion, kaj laŭplane reguligas la varprovizadon en la merkato sur bazo de disvolviĝo de la produktado kaj leviĝo de la aĉetkapablo de la socio. En la lastaj pli ol 20 jaroj la varoj liverataj en la merkato de Ĉinio estas fundamente konformaj al la aĉetkapablo de la popolo. La produktado estas adekvata al la konsumo. Tute ne ekzistas superproduktado kaj nevendebleco de varoj.

Sub la premisoj de disvolvo de produktado kaj plibonigo de la popola vivo, Ĉinio unuece regas la varprezojn por garantii longtempan stabilecon de merkataj varprezoj. Por akceli la disvolviĝon de la agrikulturo, firmigi kaj disvolvi la socialisman kolektivan ekonomion kaj plisolidigi la laboristan-kamparanan aliancon, la ŝtato plurfoje altigis la aĉetajn prezojn de agrikulturaj kaj aliaj kamparaj produktaĵoj, malaltigis la vendajn prezojn de produktaj rimedoj bezonataj en agrikulturo, malaltigis prezojn de medikamentoj, kulturaj objektoj kaj aliaj industriaĵoj. Dank' al tio malgrandiĝis la neracia diferenco inter la prezoj de la industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj, postlasita de la historio. Nun la aĉetaj prezoj de agrikulturaj kaj aliaj kamparaj produktaĵoj estas



*La Dalian-a Sepa Petrolrafinejo*

*Riĉa rikolto de greno en Sukian-gubernio de Giangsu-provinco*




duoble tiom altaj kiom tiuj en 1950. La vendaj prezoj de kemisterko, insekticido, mazuto k.a. produktaj rimedoj bezonataj de agrikulturo estas malaltigitaj ĝis triono aŭ du trionoj de tiuj en 1950. Post kiam la aĉetprezoj de greno plurfoje estis altigitaj, la vendaj prezoj de greno restas ĉiam stabilaj. La diferenco inter la prezoj de industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj malgrandiĝis je 45 pocentoj kompare kun tiu de 1950, kaj la kamparanoj povas interŝanĝi saman kvanton da agrikulturaj produktaĵoj kontraŭ multe pli granda kvanto da industriaĵoj.

Por ke la prezoj de la enlanda merkato estu stabilaj kaj ne influataj de la ŝanĝo de prezoj de la internacia merkato, Ĉinio difinis malsamajn tarifojn respektive por en- kaj eksterlanda komercado, tiel ke ne povas stariĝi rektaj rilatoj inter la prezoj de la enlanda kaj internacia merkatoj. La sendependeco kaj racia regulado de la ĉinaj varprezoj ludas aktivan rolon en akcelo de industria kaj agrikultura produktado, en stabiligo kaj plibonigo de la popola vivo, en malgrandigo de la diferencoj inter la laboristoj kaj kamparanoj, inter la urboj kaj la kamparo kaj inter diversaj lokoj, en firmigo de la laborista-kamparana alianco kaj en plifortigo de la solidareco de la naciecoj.


La nova socialisma Ĉinio praktikas komunan posedon de produktaj rimedoj kaj disvolvo de la nacia ekonomio celas plenumon de la senĉese kreskantaj bezonoj de konstruado de la lando kaj la popola vivo. Tial, ĉu en ŝtataj aŭ en lokaj entreprenoj, ĉu en la urboj aŭ en la kamparo, la specoj kaj kvantoj de produktaĵoj estas difinitaj laŭ la ŝtata plano. Kaj samtempe, la laboruloj kaj produktaj rimedoj estas laŭplane distribuitaj al la branĉoj de la nacia ekonomio, kaj la distribuado kaj liverado de vivbezonaĵoj estas unuece aranĝitaj. Anstataŭ kapitalisma libera konkurenco kaj anarkisma stato en ekonomio la nova Ĉinio praktikas laŭplanan disvolvon de sia ekonomio. Tio evitigis al Ĉinio ekonomian krizon — la nekuraceblan malsanon de la kapitalisma sistemo, ebligis al ĝi racian uzadon de

*Akvedukto de Daĝaj konstruita en 1974*




laboruloj, materialoj kaj kapitalo kaj garantias la rapidan kaj stabilan disvolviĝon de la nacia ekonomio.

Ĉinio persiste observas la principon de samtempa disvolvo de grandaj, mezaj kaj malgrandaj industriaj entreprenoj. Tio estas tre avantaĝa por plena utiligado de laboruloj, kapitalo kaj dise troviĝantaj riĉfontoj. Multaj industriaj entreprenoj troviĝas proksime al lokoj de materialoj kaj konsumantoj, kio estas tre favora al kombino de industrio kun agrikulturo. La grandaj, mezaj kaj malgrandaj industriaj entreprenoj vaste lokiĝantaj tra la tuta lando formis la firman bazon por la socialisma industrio de Ĉinio. Nun ĉiuj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj havas entreprenojn de peza kaj malpeza industrioj de malsamaj produktaj niveloj kaj plejparto de la gubernioj de la tuta lando, kaj eĉ parto de la komunumoj kaj produktaj brigadoj jam havas industriajn entreprenojn. En multaj grandaj kaj mezaj urboj disvolviĝis granda kvanto da industriaj entreprenoj administrataj de loĝkvartaloj. Dank' al tio pli kaj pli raciiĝas kaj ekvilibriĝas la dislokiĝo de industriaj entreprenoj, pli kaj pli kompletiĝas la aŭtarcio je industriaĵoj, rapidiĝas la disvolviĝo de industrio kaj la agrikulturo ricevas pli kaj pli multe da helpo de ĝi.



*Malgrandaj transformatoroj por la kamparo produktitaj de la Fuŝoŭ-a Transformatora Fabriko*



*En laborejo de la Unua Laminatejo de la Anŝan-a Ŝtala Kompanio*




*Fuhin-a Subĉiela Karbominejo de Liaŭning-provinco*

Plejeble uzi niajn proprajn riĉfontojn kaj disvolvi produkton de materiala industrio estas grava kondiĉo por la relative rapida kaj stabila kresko de la ĉina ekonomio. La socialisma sistemo de Ĉinio determinis, ke ĝi ne devas rabi alies riĉaĵojn por disvolvi sian ekonomion, same kiel faris la imperiismaj kaj social-imperiisma landoj, nek devas dependi de grandkvanta importo de krudaj materialoj, sed devas propraforte utiligi siajn riĉfontojn kaj disvolvi la produktadon de materiala industrio. Post la fondiĝo de la popola respubliko, Ĉinio faris grandskalan prospektoradon, eksciis la konservon de pli ol 100 specoj de mineraloj, per kio ĝi akiris favorajn kondiĉojn por disvolvo de produktado de materiala industrio.

Ĉinio prospektoradis siajn petrolajn konservojn, komencis ekspluati grandajn olekampojn kiel Daking, Ŝengli, Dagang k.a. kaj rapide disvolvas sian petrolan industrion. Ekde 1960 la produktokvanto de petrolo de Ĉinio plimultiĝas je 20 pocentoj en ĉiu jaro. Por disvolvi metalurgian industrion, Ĉinio konstruis multajn grandajn kaj mezajn minejojn de feraj kaj neferaj ercoj. Nun la ĉefaj ercoj bezonataj de la metalurgia industrio de Ĉinio estas tute liverataj de nia lando mem. La 9 provincoj sude de Jangzi-rivero mobilizis la amasojn en serĉado de karbo kaj multaj karbominejoj estas starigitaj. La disvolviĝintaj agrikulturo, metalurgio, karboindustrio kaj petrolkemia industrio havigas al la malpeza industrio pli kaj pli abundajn materialojn.

Dank' al la disvolvo de materiala industrio per niaj propraj fortoj, la senĉesa malkovro de riĉfontoj kaj laŭplana starigo de bazoj de materiala produktado, la ĉina ekonomio ricevis firman bazon por sia disvolviĝo. Kontraste kun la embaraso kaj depresio de produkto en la kapitalisma mondo kaŭzitaj de krizo de hejtaĵoj kaj krudaj materialoj, ĉiuj branĉoj de la ĉina nacia ekonomio leviĝas daŭre kaj progresas kun relative granda rapideco.

Riĉa rikolto de tabako en Junnan





Legomoj produktitaj de la ĉirkaŭurbo de Ŝanhajo

# Nova aspekto de la vasta tero de Hujhian

de **HI HUA**


EN frostaj tagoj de vintro mi vizitis Hujhian-gubernion de Henan, situantan oriente de Tajhang-montaro. En la historio la loko famiĝis pro la nefruktodonaj montoj en sia tereno. Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio la gubernio faris mirindajn klopodojn en lerno de Daĝaj kaj havigis al si tute novan aspekton.

## VOJO ESTIĜAS DE PAŜADO DE LA HOMOJ


La gubernio estas parto de la malnova revolucia bazo de Tajhang-montaro. En la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito, la popolo de la gubernio faris senmortan meriton sub la gvido de la Partio. Post la liberiĝo de la ĉeftero, kvankam la popolo diligente laboris por konstrui novan socialisman Hujhian-gubernion, sed la fizionomio de la gubernio ŝanĝiĝis malrapide pro la influo de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio la popolo de la gubernio profunde kritikis la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj elmetis akran demandon: Troviĝante same en la montaro Tajhang, tamen Daĝaj fariĝis pioniro en la agrikulturo de la tuta lando, Linhian-gubernio konstruis admirindan kanalon la Ruĝa Flago, sed Hujhian-gubernio nur ete ŝanĝiĝis en sia fizionomio, kial? En vintro de 1967 naskiĝis la

*La popolanoj de Hujhian reformas ŝtonozan riverbordon Hongĝoŭ*



*Ŝtonhakado*



nova partia komitato de la gubernio en la daŭra evoluo de la kultura revolucio. Granda parto de la gvidantoj de la antaŭa gubernia partia komitato, kiu altigis sian politikan konscion en la revolucio, estis elektita de la amasoj kiel membroj de la nova gvidantaro. Ili decidis preni la Grandan Proletan Kulturan Revolucion kiel novan startpunkton por daŭrigi la revolucion. En la unua kunveno de la gubernia partia komitato ili faris rezolucion pri plia akcento de ideologia revolucio de la gvidantaro. Ili decidis diligente studi Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, pli profunde kritiki revizismon, pene reformi sian mondkoncepton kaj bone gvidi la amasojn en lerno de Daĝaj.

En la sezono de neĝado la membroj de la konstanta komitato de la partia komitato iris en la montaron kunportante litaĵon. Malgraŭ la altaj montoj kaj malfacilaj vojetoj, ili vizitis multajn brigadojn kaj faris tie fizikajn laborojn kaj enketadon. Jingsigoŭ-brigado de Nanĝaj-komunumo, kiu situas tre profunde en la montaro, estis fame konata kiel malriĉega kaj senperspektiva loko en la historio. Tie vivis maljunulo Juan Giaking, kiu sin dungigis al bienuloj same kiel liaj avo kaj patro antaŭ la Liberiĝo. En dudek jaroj li persistis en konstruado de kampoj en ŝtonkovrata montvalo kaj fine kreskigis tie bonajn grenplantojn. Kiam li grave malsaniĝis, li ankoraŭ laboris en kampo malgraŭ admono de la vilaĝanoj. Li oferis sian lastan tempon de la vivo al la kolektivo. Liaj lastaj vortoj estas: "La kampoj ankoraŭ ne estas finkonstruitaj kaj la plantitaj arboj ne sufiĉaj. Vi devas aŭskulti la vortojn de la Partio kaj daŭre klopodi." La dekoj da kampoj postlasitaj de la maljunulo donis bonegan lecionon al la vizitantaj gubernia gvidantoj. Ili diris emocie: "Antaŭe nia gubernio ne radikale solvis la problemon de montregiono. Estonte ni devas observi la fundamentan linion de la Partio, bone organizi la amasojn en grandskala konstruado de socialisma kamparo por ĝisfunde ŝanĝi la postiĝintan kaj malriĉan fizionomion de la montregiono."

La gvidantoj de la gubernio venis en la amasojn kaj ekhavis komunan senton kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, dank' al kuna laborado kaj vivado kun ili. La amasoj de la montaj vilaĝoj diris ĝoje: "Revenis la soldatoj de la antaŭa Okavoja Armeo!" Ili rememoris kune kun la kadroj la streĉan kaj malfacilan vivon en la jaroj de revolucia milito. Multaj kadroj diris emocie: "La tero estas defendita de niaj martiroj per la sango kaj vivo. Ĉu ni povos esti indulgeblaj antaŭ tiuj mar-

tiroj, se ni postvivantoj ne povos fari la lokon bela?" La kadroj decidis disvolvi la revolucian spiriton kaj fari kontribuon por la popolo.

La partia komitato de la gubernio ellaboris planon pri ŝanĝo de la postiĝinta fizionomio de la gubernio. Miloj kaj dekmiloj da kamparanoj estis organizitaj en sinteza reordigo de la montoj kaj riveroj de la gubernio. Post kelkjara klopodado la popolo de la gubernio kreis 2,000 hektarojn da kampoj, konstruis 370 kilometrojn da ŝoseoj en la montaro, 33 mezajn kaj malgrandajn akvorezervejojn kaj 140 elektrajn pumpstaciojn, fosis 4,800 maŝinputojn kaj 2,800 kilometrojn da likimuna kanalo kaj konstruis 69 fabrikojn de kemisterko, cemento kaj maŝinfarado kaj karbominejojn. Ĉio ĉi tio akcelis la disvolviĝon de agrikultura produktado. En 1974, kvankam la gubernio estis atakita de sekeco, sed ĝia hektara produktokvanto de greno estis 2.4-oblo de tiu en 1965. En 1975 la hektara produktokvanto de tritiko superis 3,750 kg., kaj la totala produktokvanto de tritiko estas 1.5-oblo de tiu de ĉiuspecaj grenoj de 1965.

## "ILI ĈIUJ ESTAS ORDINARAJ LABORULOJ"

Dum la vizitado en Hujhian-gubernio mi malofte povis renkontiĝi kun kadroj en la oficejo, ĉar la plejparto de ili iris en la bazajn unuojn por tie fari enketadon kaj fizikajn laborojn. Ili tiel faras por radikale forigi la postsignojn de malnova mandarena oficejo. En la lastaj 7 jaroj en la oficejo de la gubernia partia komitato ofte deĵoras nur dekkelkaj personoj por zorgi ĉiutagajn laborojn. Ankaŭ gvidantoj de komunumoj tiel agas. Ili ellitiĝas frue kaj hejmenrevenas malfrue por reformi sian lokon kune kun la amasoj.

Kiel stariĝis la nova revolucia moro? Membro de la gubernia partia komitato rakontis al mi jenan okazintaĵon: Nelonge post la fondiĝo de la nova gubernia partia komitato, iu maljuna malriĉkamparanino trovis perditan porkon kaj venis al la gubernia urbo por peti iujn unuojn helpi ŝin trovi la perdinton. Sed oni rifuzis ŝin dirante, ke tio ne estas ilia devo. Sciiĝinte pri tiu afero, la partia komitato tuj kunvokis al kunveno la laborantojn de la organoj rekte gvidataj de la gubernia partia komitato kaj invitis la avinon rakonti al ili la okazintaĵon por doni al ili lecionon pri tutkora servo al la popolo.

Kaj ankaŭ aliaj similaj aferoj edukis la membrojn de la gubernia partia komitato kaj ili komprenis, ke la esenca diferenco inter la revolucia regpotenco de la proletaro kaj la malnova mandarena oficejo kaj tiu inter la kadroj de la popolo kaj la malnovaj burokratoj estas, ĉu servi aŭ ne al la laboranta popolo. Ili decidis reformi la organojn de regpotenco por ke ili povu pli bone interrilatiĝi kun la amasoj. Sekve do la organoj de la gubernio estis simpligitaj, multnombraj kadroj estis senditaj en la bazajn unuojn, kaj la kadroj restantaj en la oficejoj ĉiujare laboras, faras enketadon kaj solvas problemojn en bazaj unuoj dum du trionoj de la tuta tempo. Multaj kunvenoj estas kunvokitaj en montvilaĝoj aŭ konstruejoj.

La ŝanĝo de laborstilo estas revolucio en ideologio kaj estas aprobata de vastaj amasoj kaj kadroj. Sed iuj diris: "La kadroj laboras en kabinetoj, dum la komunumanoj en la kampoj, tio estas kutimo neinversigebla."

Por kritiki tian penson, la gubernia partia komitato lasis la kadrojn ripetade lerni la instruojn de Prezidanto Maŭ pri tio, ke partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro helpas venki burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismon. La partia komitato de la gubernio montris: Ĉu oni nur sidadu en oficejoj aŭ kunfandiĝu kun la amasoj por doni ekzemplon en laboro, ĉu sintenu kiel grandsinjoroj aŭ laboru kiel servistoj de la popolo? Jen estas rigora provo por montri ĉu ni kadroj povas daŭrigi la revolucion aŭ ne.

En tiu batalo la unua sekretario de la gubernia partia komitato Ĝeng Jonghe donis bonan ekzemplon per siaj konkretaj faroj. En la gubernio vaste cirkulas la rakonto pri ŝtonhakista ekzameno por Ĝeng Jonghe kaj aliaj gvidantoj. La akvorezervejo Ĉengiajuan estas la unua meza

akvorezervejo de la gubernio. Estis ne sufiĉe da ŝtonhakistoj kaj la komandejo de la konstruejo telefonis al la gubernia partia komitato por ke ĝi disponigu pli da ŝtonhakistoj. Anstataŭ sendi ŝtonhakistojn, Ĝeng Jonghe venis al la konstruejo kun aliaj membroj de la gubernia partia komitato sub sia gvido. Li diris al la direktanto de la konstruado: "Ekzistas la montaro Tajhang, do devas esti ŝtonhakistoj. Kion la revolucio bezonas nin fari, tion ni lernos. Tio estas konscienca revoluciado." Li proponis establi por la kadroj kurson de ŝtonhakado kaj invitis ŝtonhakistojn kiel iliajn instruistojn. Tage ili lernis ŝtonhakadon kaj nokte studis la verkon de Prezidanto Maŭ "Montotranslokado Fare de la Malsaĝa Avo". Ili lernis pli ol 20 tagojn kaj partoprenis en ekzameno pri tekniko antaŭ la publiko. Inter la pli ol 20 membroj de la gubernia partia komitato Ĝeng Jonghe gajnis la trian lokon en la ekzameno.


Kiam informo pri la supre dirita afero disvastiĝis tra la tuta gubernio, popolamasoj eklernis ŝtonhakadon kun granda entuziasmo. Oni diris: "Se oni ne kuraĝus batali kontraŭ ŝtonoj vivante en la montaro Tajhang, ili ne estas Malsaĝaj Avoj." La nombro de ŝtonhakistoj de la gubernio rapide plimultiĝis de 3,000 ĝis 40,000. La ŝanĝo de laborstilo de la gvidantoj kuraĝigis milojn kaj dekmilojn da homoj en reformo de la loko.

En la lastaj jaroj la gvidantoj de la gubernio persistis en partopreno en laboro kaj ĉiam iris al plej malfacilaj lokoj por tie fari plej pezan kaj plej malfacilan laboron. Ĝeng Jonghe kaj la dua sekretario de la partia komitato Vang Hebaŭ ofte portadis cementon al la konstruejo de akvorezervejo aŭ karbon al loĝantoj de montvilaĝoj malgraŭ frosta neĝa vetero. Kiam oni konstruis ŝoseon sur montoj, vicsekretario Ĝang Minghin ligis sian talion per ŝnuro kaj pendante en aero hakis rokmurojn kune kun aliaj konstruantoj. Ne nur kadroj en la bazaj unuoj, sed ankaŭ tiuj restantaj en la oficejoj de la gubernio devas fari fizikajn laborojn. Al

*La unua sekretario de la gubernia partia komitato de Ĥujhian Ĝeng Jonghe en laborado*



*Kampoj sur monto*



la lastaj estis difinitaj ne nur tempo de laborado, sed ankaŭ laborkvanto. La komunumanoj laŭdis ilin, ke ili estas ordinaraj laboruloj, kvankam ili estas ŝtataj oficistoj.

## TUTE NOVA SPIRITA FIZIONOMIO

La movado de lerno de Daĝaj ŝanĝis la naturan fizionomion de Hujhian, kaj ankaŭ la spiritan fizionomion de tieaj homoj.

La popolo de Hujhian-gubernio havis gloran revolucian tradicion en la pasinteco, kaj hodiaŭ ili tre atentas la disvolvon de la revolucia spirito de la militaj jaroj. Ĉiun vintron la gubernia partia komitato instigis junajn kadrojn, instruistojn kaj lernantojn grimpi Tajhang-montaron por lerni de la Okavoja Armeo la revolucian spiriton. Tage ili laboras kune kun komunumanoj kaj vespere studas kune kun la lastaj verkojn de Prezidanto Maŭ kaj faras al si edukon pri la revolucia tradicio de penema lukto. Kiam la kamiona taĉmento estis starigita, la partia komitato postulis la junulojn, kiuj venis de diversaj konstruejoj por labori poste kiel ŝoforoj, ke ili portu al montanoj karbon per puŝĉaroj aŭ vektoj, por ke ili ne forgesu la malfacilojn en la pasinteco kaj ne forgesu la spiriton de penema luktado.


La membroj de la partia komitato de Hujhian-gubernio ofte diris, ke sen socialisma penso oni ne povas grandskale disvolvi la socialisman agrikulturon, nek elkulturi novajn kamparanojn kun socialisma penso. La fakaj taĉmentoj, kiuj laboras sur diversaj konstruejoj de kampa fundamenta konstruado, ofte vivas kolektive kaj plenumas malfacilegan laboron. Krom laborado ili studas Marksismon-Leninismon kaj kritikas burĝaron, kaj havigis al si grandan ŝanĝiĝon en spirita fizionomio. Multaj konstruantoj diris, ke veninte de sia hejmo al la konstruejo, ili kvazaŭ suprenirus de valo al la montsupro kaj ekhavis pli vastan vidkampon. Antaŭe ili vidis nur ĝis la pinto de sia nazo, sed nun ili zorgas pri la kolektivo kaj la ŝtato.

En reformado de la fizionomio de la gubernio la partia komitato rigore observas la diversajn ekonomiajn politikojn de la Partio en la nuna periodo, kaj samtempe donas sufiĉan atenton al edukado al kamparanoj, por ke ili disvolvu komunisman stilon kaj vastigu la vidkampon limigitan de la etkamparana ekonomio. La akvorezervejoj Ŝimen, Ĉengiajuan, Ŝijuan, Hoŭĝuang k.a. ĉiuj estas fruktoj de socialisma kunlaboro kaj komunisma spirito. Kiam mi vizitis la konstruatan akvorezervejon sur la rivero Hiangmu, mi vidis, ke multaj kamparanoj venintaj de diversaj komunumoj jam konstruis sur montodeklivoj domojn kaj kampojn por la loĝantoj ĉirkaŭ la akvorezervejo. Komunumano, kiu baldaŭ transloĝiĝos en novan domon, diris al mi montrante iun vojeton apud la rivero, ke ĝuste tra tiu vojeto lia familio elmigris en Ŝanhi por almozpeti, sed nun li iras la vojon montritan de Prezidanto Maŭ celantan komunan feliĉon. La vojeto estos englutita de la akvorezervejo kaj oni neniam plu iras ĝin.

Mi ascendis la digon altan je 90 metroj de Ŝimen-akvorezervejo kaj vidis belegan pejzaĝon de la artefarita lago multe pli alta ol la tero. La gvidantoj de la gubernio diris al mi montrante la majestan Ŝimen-montpinton starantan en malproksimo, ke en la militaj jaroj, 4 revoluciaj soldatoj estis sieĝataj de malamikoj sur la montsupro, ili kune saltis de sur la montsupro post pafo de la lasta kuglo kaj heroe martiriĝis. La revolucia spirito de la martiroj ĉiam kuraĝigas la homojn. Dum la konstruado de la akvorezervejo okazis akcidento kaj en tio mortis konstruanto Baj Jongji. Lia edzino diris al la gvidantoj de la gubernio, kiuj venis konsoli ŝin: "La laboro de Jongji ne estis finita, do mia filo ĝin daŭrigu." Ŝi sendis sian unuan filon Baj Fucaj al la konstruejo. La lasta laboris tutforte kaj trifoje estis elektita kiel labormodelo. Poste oni sendis lin labori en karbominejo kaj lia patrino sendis lian fraton al la konstruejo. Post nelonge la komandejo de la konstruejo ricevis sumon da mono senditan de Baj Fucaj per la poŝto kaj leteron, en kiu Fucaj skribis, ke li donacas sian ŝparmonon al la konstruejo de la akvorezervejo, pro ke li ne povas partopreni plu en la konstruado.

En la gubernio Hujhian troviĝas multaj tiaj gepatroj kaj junuloj, kaj ĝuste dank' al tiaj popolanoj senĉese progresas la gubernio Hujhian.

# Nova fizionomio de montregiono de Longŝeng



Antaŭurbo de Longŝeng

La Longŝeng-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio situanta en montaro de la norda parto de la Guanghi-a Guang-nacieca Aŭtonoma Regiono estas loko trapasita de la Ruĝa Armeo dum la Longa Marŝo. Ĝi havas 130,000 loĝantojn de la naciecoj mjaŭ, jaŭ, dung, ĝuang kaj han.

Sub tiranado de la kuomintanga reakciularo antaŭ la Liberiĝo, la popolo de Longŝeng baraktis generacion post generacio en amara maro kaj vivis mizere kiel brutoj.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj sub direktado de la nacia politiko de la Partio, la diversnaciecaj popolanoj de Longŝeng farigis mastroj de la ŝtato. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, disvolvante la revolucian spiriton "apogi sin sur propraj fortoj", la popolo klopodis 5 jarojn kaj fosis kanalon longan je 67.5 km. serpentumantan sur pli ol 100 montoj. Ili konstruis novajn ŝtuparajn kampojn de pli ol 2,000 hektaroj, pli ol 1,890 akvokondukajn konstruaĵojn kaj 77 elektrajn pumpstaciojn. La areo de akvokampoj de tiu gubernio estas kvaroblo de tiuj antaŭ la Liberiĝo kaj meznombra hektara produkta kvanto de greno estas preskaŭ duoblo de tiu antaŭ la granda kultura revolucio. Sub la direktado de la principo **"preni grenproduktadon kiel ĉefĉeneron kaj samtempe disvolvi aliajn"**, ankaŭ la forstumado, brutobredado, flankokupoj kaj fiŝado de tiu gubernio rimarkinde disvolviĝis.


En fabriko de agrikulturiloj



Krome, la gubernio starigis pli ol 20 fabrikojn de agrikulturiloj, lignoprilaborado, fosfora sterko, agrikulturaj insekticid-presado kaj vino. Ĉiuj komunumoj de la gubernio starigis agrikulturilan riparejon kaj traktoran stacion. Unuapaŝe meĥanizitaj aŭ duonmeĥanizitaj estas plugado, drenado, irigaciado, transportado kaj draŝado.



En magazeno



Hidroelektrejo




Transplantado



Sekretario de la partia komitato kaj estro de la revolucia komitato de Longŝeng-gubernio Jang Tongming (la dekstra) laboras sur la kampo.







Sur konstruejo de irigacia sistemo



Meteostacio

Ŝtuparaj kampoj





Rikoltado






Trejnado de traktoristoj



Kolektado de drogherboj



Ŝoseoj ligas ĉiujn komunumojn.

Filmo

# "La pioniroj"



Ĝoŭ Tingŝan soife studas verkojn de Prezidanto Maŭ por elĉerpi el ili fortojn.



Ĝoŭ Tingŝan, la suferplena laboristo de Juming-petrolkampo sopiras al liberiĝo de Ĉinio.




Heroo de la filmo — petrolisto Ĝoŭ Tingŝan



Liberiĝis Juming-petrolkampo! Hua Ĉeng, politika komisaro de iu regimento de ĈPLA, diras al Ĝoŭ Tingŝan: "Prezidanto Maŭ zorgas nin petrolistojn sur Gobio. kaj la espero de la petrola industrio de nia lando estas metita sur vin. . ."




ua Ĉeng, la politika komisaro de la fronta koman-
-ejo de la petrolkampo, firme subtenas la projekton
e Ĝoŭ Tingŝan, ke oni konu la strukturon de la
i areoj en unu jaro.



Ĝoŭ Tingŝan kaj petrolisto Joŭva pene laboras sur ŝakto skafaldo.



e estas sufiĉaj transportiloj kaj laboristoj do, sub la
vido de politika komisaro Hua kaj Ĝoŭ Tingŝan.
radas ŝaktoskafaldon kaj borilegon parton post parto
an pezo de kelkdek tunoj al Longhutan.



Por ĉesigi la kotŝprucon, malgraŭ akra doloro, Ĝoŭ Tingŝan saltis en miksbasenon por kirli koton.



olitika komisaro Hua indigne diris al Ĝoŭ Tingŝan,
li sciigu al la laboristoj ke la modernaj reviziistoj
ompis la komercajn kontraktojn kaj ĉesigis livera-
on de promesitaj oleoj al Ĉinio.



La senlime vasta petrolkampo en la leviĝanta ruĝa sun proklamas al la tuta mondo, ke por ĉiam ĉesis la uzad de fremdlanda oleo de la ĉina popolo.

ĈANG JING:

# Kolora filmo "LA PIONIROJ"

PRENANTE kiel fonon la batalon de petrolistoj antaŭvespere de la Liberiĝo por defendi Juming-petrolkampon kaj la petrolan kampanjon en la komenco de la sesdekaj jaroj, la filmo prikantas la ĉinajn petrolistojn kun Ĝoŭ Tingŝan kiel reprezentanto. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio ili konstruis grandan petrolkampon sur la vasta stepo en batalado kontraŭ la naturo kaj eraraj pensoj kaj kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj, vivece spegulante la heroisman sentimecon de la ĉina laboristaro. La filmo varme prikantas la grandan venkon de la principo de Prezidanto Maŭ **"sendependeco, memstareco kaj sinapogo sur propraj fortoj"**.

Aŭtune de 1949 la Ĉina Popola Liberiga Armeo akiris brilan venkon de la Liberiga Milito kaj Juming-petrolkampo estis liberigota. En senlime vasta dezerto malrapide moviĝas aro da kameloj portantaj nafton, kaj la petrolisto kondukanta la kamelojn estas Ĝoŭ Tingŝan, la heroo de la filmo.

Iun nokton Ĝoŭ Tingŝan kaj lia patro majstro Ĝoŭ interparolas kune kun kelkaj laboristoj pri alveno de iu ĈPLA-ano. En tiu tempo la kuomintangaj trupoj, kiuj dronis en ĥaoso kaj pretis forfuĝi, intencis ruinigi la petrolkampon antaŭ la veno de ĈPLA. Sub la gvido de la subtera organizo de la Partio la laboristoj estrataj de majstro Ĝoŭ brave leviĝis al batalo por defendi la petrolkampon. Poste Majstro Ĝoŭ estis arestita kaj mortigita de la malamiko pro denunco de perfidulo. Ĝoŭ Tingŝan decidis daŭrigi la aferon de la patro.

Por gardi geologiajn materialojn kaj fakulojn, Ĝoŭ Tingŝan majeste paŝis en la vilaon de kapitalisto. La usona konsilanto agitas inĝenieron Ĝang Jiĝi forfuĝi kun ĉinaj geologiaj materialoj. Tamen la lasta, kiu amas sian patrolandon, decidas resti por potencigi sian patrujon per siaj lernitaj scioj. La usona konsilanto kriaĉas: "Sen la Petrolkompanio 'Standard' ĉe vi regos plena obskuro!" En indigno Ĝoŭ Tingŝan ekprenis sitelon da keroseno kaj plenforte elverŝis ĝin sur la usonan konsilanton.

Liberiĝis Juming-petrolkampo kaj ekbolis la granda dezerto.

Dek jaroj forpasis. Ĝoŭ Tingŝan jam kreskis en firman proletaran pioniron kaj fariĝis estro de putobora taĉmento, kiu estas modela taĉmento fame konata en la tuta petrolkampo. En la honoro Ĝoŭ Tingŝan ankoraŭ sentas, ke ilia kontribuo al la ŝtato estas tro malgranda, kaj sur lia brusto kvazaŭ pezas ŝtono, ke ili ne ekspluatis pli multe da petrolo por la ŝtato en la pasintaj dek jaroj. Ĝuste en tiu tempo, venis ĝojinda informo pri trovo de granda naftokonservo en la vasta stepo de norda Ĉinio. Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio decidis fari tie petrolan kampanjon per plejparto de la personoj de la petrola fronto. La putobora taĉmento de Ĝoŭ Tingŝan venis de Juming-petrolkampo al neĝkovrata stepo post longa vojaĝo. La petrolistoj venintaj de diversaj lokoj de la lando kunfandiĝis, plenis de gajeco kaj vivigis la stepon.

En la komandejo de la petrolkampo dense sidas laboristoj, inĝenieroj kaj teknikistoj. Iras kunsido pri projekto de la petrolkampo. La kunsidon prezidas Hua Ĉeng, la politika komisaro de la komandejo, de 40 jaroj kun iom pli. Li estis politika komisaro de regimento de ĈPLA, kiu organizis antaŭ dek jaroj la laboristojn en defendo de Juming-petrolkampo. Li kaj ĉefinĝeniero Ĝang Jiĝi la unuaj venis tien laŭ ordono. En tiu regiono estas tri petrolaj strukturoj, nome Tiangiaĝuang, Longhutan kaj Vumingdi. La esploraj putoj en Tiangiaĝuang jam produktas

oleon. La aliaj du pli grandaj strukturoj estis ne prospektoritaj. Kiel prospektoradi tiujn strukturojn? Ĉu lante rampi laŭ la vojo de fremdaj landoj aŭ elhaki nian propran vojon per niaj propraj fortoj? La kunvenon trairas akra diskuto. Subtenate de vickomandanto Feng Ĉaŭ, ĉefinĝeniero Ĝang, kiu estas grave toksita de kompradora filozofio, elmetis "rampisman" projekton pri prospektorado de la strukturoj. Kaj Feng Ĉaŭ, perfidulo kaj fremda elemento de la proletaro kaŝinta sian kriman historion, elmetis aldonojn al la projekto, kiuj bezonos grandegan investon. Sed Ĝoŭ Tingŝan proponas en akra kontrasto prospektoradi grandskale kaj sekci la tutan regionon por serĉi pli grandan petrolkonservon. Lia projekto konforma al la opinio de la partia komitato ricevas subtenon de la politika komisaro Hua kaj plejparto de la ĉeestantoj. Tuj komenciĝis borado de la puto n-ro 1 en Longhutan.

La komenco de la kampanjo signifas komencon de la decida batalo inter la du linioj. En la komenco de la sesdekaj jaroj imperiismo kaj reviziismo en kunago faris al Ĉinio politikan subpremon kaj ekonomian blokadon. Tiam Ĉinio suferis gravan naturan katastrofon en tri sinsekvaj jaroj kaj la nacia ekonomio sin trovis en malfacilo. Tiam ĝuste kiel prezentas la filmo, reviziistoj vendis al nia lando oleon je la prezo duoble pli alta ol tiu de la kapitalisma merkato kaj krome miksis en ĝin ĉevalfekaĵon kaj sulfuron. La putobora taĉmento de Ĝoŭ Tingŝan tutkore klopodas por frue kaj multe bori putojn por rompi blokadon de imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj kaj forigi premon de sur la ŝtato. Ne sufiĉaj estas transportiloj, laboristoj do mem transportis ŝaktoskafaldon kaj borilegojn kun pezo de dekoj da tunoj al la konstruejo de Longhutan. Mankas al ili akvodukto ili do transportis akvon per lavkuvoj kaj glacion per ŝultro. Venkinte diversajn malfacilojn ili fine komencis la boradon de la puto n-ro 1 de Longhutan. Sed riĉa mezkamparano, sub la instigo de Feng Ĉaŭ, transmovis la markan foston de la jam mezurita putopozicio, kaj la borita puto ne ŝprucigis petrolon. Ne deprimiĝinte en la malsukceso, Ĝoŭ Tingŝan ĉiamaniere trovis la kaŭzon kaj komencis bori la duan puton.

Feng Ĉaŭ intrige ĉesigis la grenan provizon al la taĉmento de Ĝoŭ Tingŝan, por ke ĝi devigite forlasu boradon de la puto n-ro 2 en Longhutan. Malgraŭ tio Ĝoŭ Tingŝan kaj liaj kolegoj persistas en borado sub malfacilaj kondiĉoj. Iu junulo de la taĉmento de Ĝoŭ Tingŝan ekŝanceliĝis antaŭ malfacila laborado pro la tento kaj influo de la riĉa mezkamparano kaj perdis saketon de sabla specimeno de normala tavolo pro malatentemo. Kiam politika komisaro Hua faras severan kritikon al la taĉmento de Ĝoŭ en kunveno, Ĝoŭ Tingŝan suriris la podion kun la retrovita saketo kaj modeste prenis sur sin la respondecon, rigardante la sloganon "Konscie kaj rigore ekzamenu sin". Lia revolucia spirito kortuŝis liajn kunbatalantojn sidantajn en la kunvenejo kaj edukis la junan laboriston. Ĉe tio Feng Ĉaŭ malice kalumniis Ĝoŭ Tingŝan, ke li incitis la kapitalisman tendencon per aĉeto de terpomoj de kamparanoj. Sed la fakto estas tute mala: Ĝoŭ Tingŝan donis sian ŝparmonon al malriĉkamparano, kiu donacis terpomojn al la taĉmento, kiam ĝi ne havis grenon pro la intriga ĉesigo de grenoliverado fare de Feng Ĉaŭ. Ĝoŭ Tingŝan tuj konsciis, ke tio estas batalo inter la du klasoj kaj linioj, kaj faris rebaton.

Ĝoŭ Tingŝan venkis, tamen aperis nova kontraŭdiro. La puto n-ro 2 de Longhutan ŝprucigas nur akvon sed ne petrolon. Feng Ĉaŭ instigas ĉefinĝenieron Ĝang revoki Ĝoŭ Tingŝan de Longhutan. Ĝoŭ Tingŝan ne plenumis lian ordonon, sed studis kune kun laboristoj la verkojn de Prezidanto Maŭ "Pri Kontraŭdiro" kaj "Pri Praktiko" kaj dank' al tio ili konis, ke por akiri petrolon oni devas unue elĉerpi akvon. Post ilia klopodado ne nur la puto n-ro 1 sed ankaŭ la puto n-ro 2 de Longhutan ŝprucigis petrolon.

La vojo de pioniroj estas zigzaga kaj la klasa batalo intensa. Kun espero de la Partio kaj la popolo Ĝoŭ Tingŝan kaj lia taĉmento venis al Vumingdi. Ĝuste tiam la modernaj reviziistoj perfidis sian promeson, rompis ĉiujn kontraktojn kun Ĉinio kaj ĉesigis liveradon de mazuto al Ĉinio. Por ke la bormaŝinoj ne haltu, la familianoj de laboristoj starigis olerafinejon kaj transportis la rafinitan mazuton al la maŝino. Ĝoŭ Tingŝan kaj lia taĉmento ĉiamaniere ŝparas

ĉiun guton da mazuto kaj laboras sur la ŝaktoskafaldo de Vumingdi kun ankoraŭ pli granda entuziasmo. Subite la putomuro falis pro tro alta premo en la puto. Por protekti la puton kaj ŝirmi aliajn kamaradojn Ĝoŭ Tingŝan vundiĝis je la gambo. Tiam inĝeniero Ĝang alvenis por disponigi mazuton de la putobora taĉmento de Ĝoŭ Tingŝan al aliaj taĉmentoj kaj devigi lian taĉmenton evakui Vumingdi. Ĝoŭ Tingŝan sin detenis de kolero kaj sincere kaj varme kritikis la eraron de la ĝenerala inĝeniero. Ankaŭ la politika komisaro Hua alrapidis kaj kritikis la eraran opinion de Ĝang montrante: "Laboristoj estas kreantoj de la historio kaj la mastroj de nia lando kaj ankaŭ de la petrolkampo!" Ĝoŭ Tingŝan vundiĝis en protekto de la olekampo, sed li ankoraŭ varme kritikas Ĝang eltenante grandan doloron. Tio multe emociis ĉefinĝenieron Ĝang, li kortuŝiĝis ĝis larmoj kaj konsciis sian eraron. En tiu tempo Feng Ĉaŭ informis, ke klariĝis la afero de la morto de majstro Ĝoŭ pro lia perfido, li antaŭsentis sian pereon. Riske al ĉio li enŝovis bulon da fadenoj en la drilmaŝinon por ke la drilego ŝtopiĝu kiam ĝi atingos altpreman oletavolon kaj okazu akcidento. Poste li ŝteliris en ŝaltilejon kaj intencis estigi ankoraŭ pli grandan akcidenton per ŝaltado. Sed Ĝoŭ Tingŝan jam rompis la elektran cirkviton kaj Feng Ĉaŭ estas kaptita ĉe la loko.

La laboristoj streĉe klopodas ĉe la ŝaktoskafaldo kaj kotbaseno. Se oni ne ĉesigos la ŝprucigon, la bormaŝino kaj ŝaktoskafaldo ambaŭ ruiniĝos. Mankas al ili baritpulvoro, ili nur povas aldoni cementon en la kotbasenon. Por rapide miksi la cementon Ĝoŭ Tingŝan saltis en la basenon kaj aliaj lin sekvas unu post alia.

La akcidento estas forigita kaj la petrolputo de Vumingdi ekŝprucigis nafton. Ĝi proklamas al la tuta mondo, ke por ĉiam forpasis la epoko, en kiu la ĉina popolo uzis petrolon de fremdaj landoj. Ĝoŭ Tingŝan fiere diras: "Sen la Petrolkompanio 'Standard' kaj spite al la premo de la reviziismo, ĉe ni estas plena lumo!"

En la fino de la filmo prezentiĝas antaŭ la rigardantoj la senlima petrolkampo kaj la leviĝanta suno.

## Antikvaj Ĉinaj Fabloj

# Sen la lipoj la dentoj estas atakataj de malvarmo

En antikveco, estis du malgrandaj regnoj Ju kaj Guo, najbaraj unu al la alia. Tiutempe, la regno Gin ambiciis aneksi ilin, sed timis, ke ili agos solidare kaj helpos unu la alian por rezisto. La regnestro Hiangong do alprenis artifikon. Li sendis Hjun Hi al la regnestro de Ju kun kvar elitaj ĉevaloj kaj paro da valoregaj diskoj el blanka jado kiel donacoj, por peti permeson, ke militistoj de Gin-regno trairu tra Ju-regno por ataki Guo-regnon. La regnestro de Ju tre ŝatis la ĉevalojn kaj jadajn diskojn kaj pretis konsenti. Tiam lia kortegano Gong Ĝiki elpaŝis kaj diris: "Ne permesu. Proverbo ja diras, ke sen la lipoj, la dentoj estas atakataj de malvarmo. La regnoj Ju kaj Guo dependas unu de la alia kaj helpas unu la alian, kiel la lipoj kaj dentoj. Se la lipoj malaperus, ĉu la dentoj povus defendi sin kontraŭ malvarmo? Se hodiaŭ vi konsentus, ke Gin-regno aneksu Guo-regnon, morgaŭ Ju-regno ricevus la saman sorton!" Sed la regnestro de Ju obstine rifuzis la admonon de Gong Ĝiki kaj akceptis la ĉevalojn kaj jadajn diskojn. Poste Gin-regno konkeris Guo-regnon helpe de Ju-regno kiel trairejo, aneksis la lastan revenvoje kaj reprenis la valoregajn jadajn diskojn kaj elitajn ĉevalojn.

# Aliflanko de la celebrado pri la konkero de Ŝanhajo kaj Nankino[1]



**Lusin**

*La jena grava artikolo verkita de Lusin en 1927 estas retrovita antaŭ nelonge de Ĝongŝan-Universitato en Kantono. Ĉi tie ni aperigas ĝin en esperanta vesto laŭ la teksto, republikigita en la Popola Ĵurnalo.*

— La Red.


Ŝajnas al mi, ke aparte multaj estas la memorigaj kaj celebraj solenoj en Kantono. Tio estas nepra fenomeno, kiam la revolucio estas en progresado kaj venkoj. Pri la konkero de Ŝanhajo kaj Nankino[2] mi mem jam du-foje ĝojis private, kiam mi legis la informojn. Unu el la sekvoj de tio, ke "mi ĝojas dum la aliaj penadas" estas ricevo de la peniga tasko rompi la kapon por tordelpremi artikolon. Fakte, mi ne tre taŭgas por tia afero, ĉar kiam mi manipulas mian plumon, mi ĉiam trovas ke ĝi tute glitis tre fore de la temo. Eĉ nun — ĉu mi ne volas skribi pli trafe? — sed miaj pensoj tamen forvagas kaj mi ne povas revenigi pli decajn ideojn, kiuj similas al kajto kies ŝnuro rompiĝis. Subite mi ekpensis pri la junuloj renkontitaj hieraŭ en Huangpu kiuj venis sin anonci por aniĝi al la studentaj trupoj kaj mi ekkonsciis ke, kiuj riskas sian vivon sur la fronto, estas ĝuste tiaj homoj. Mi ja devas honti pri mi mem, kiu nur iom babilas laŭplaĉe en la aŭditorio kaj tuj tromprikoltis aplŭdon de la aŭskultantaro[3]. Jen mi ekpensas, ke Nankino estis jam foje konkerita antaŭ dek ses jaroj[4] kaj tie estis cetere starigita monumento memore al la soldatoj kiuj oferis sian vivon. Tamen, en la dua jaro post la fondiĝo de la Ĉina Respubliko ĝi estis detruita de Ĝang Hjun[5], kaj en la nuna jaro oni povus starigi novan. Kaj jen mi ekpensas pri la informo en la tagĵurnalo "Cirkulado" de Honkongo, ke estis enkarcerigita Li Ŝoŭĉang[6], kaj tuj aperis antaŭ miaj okuloj lia ronda vizaĝo kun pendantaj, nigraj, ĉin-stilaj lipharoj. Nu, kiel nun estas al li?

En la malluma regiono, ankaŭ la laboro de la kontraŭrevoluciuloj silente iradas. Kvankam post la fronto estas ĝemoj, tamen ankaŭ troviĝas iuj, kiuj ĝojas. Ja ekzistas granda diferenco inter la ĝemo kaj la ĝojo post la fronto, sed ambaŭ nenion helpas por la afero. La fina venko ne dependas de la nombro de tiuj, kiuj ĝojas, sed de la nombro de tiuj, kiuj ĉiam marŝas antaŭen kaj atakas. Kiel mi memoras, en iu periodajo[7] oni citis jenajn vortojn de Lenin:

> **La unua grava afero estas ne ebriiĝi nek fieriĝi de la venko; due, solidigi nian venkon, ke ĝi ĉiam apartenu al ni; trie, ekstermi la malamikon, ĉar la malamiko nur estas venkita, sed estas ankoraŭ tre malproksime de ekstermiĝo[8].**

Rusio estas finfine lando de revolucia tradicio kaj Lenin sperta revoluciulo. Li ne povus diri tion, se li ne profunde scius la kaŭzojn de la sukcesoj kaj malvenkoj de la revolucioj en la historio kaj mem ne akumulus al si multajn spertojn. En la pasinteco la ĉinaj revoluciuloj suferadis malvenkojn fojo post fojo. Mi opinias, ke la kaŭzo kuŝas ĝuste en tio, ke ili neglektis la suprediritan punkton. Kiam ili akiris malgrandan venkon, ili ebriiĝis kantante pri sia triumfo, kun malstreĉitaj muskoloj, forgesante fari pluajn atakojn. Tiam la malamikoj releviĝis profitante la okazon.

En la antaŭlasta jaro mi skribis artikolon por insisti, ke necesas doni ankoraŭ batojn al "hundo faligita en akvon"[9]. Tiam estis naivuloj, kiuj opiniis, ke tio estas tro rigora kaj tro malsufiĉa de grandanimeco kaj indulgemo, kaj krome ke,


慶祝滬寧克復的那一邊

se mi tiel agos kontraŭ la alia kaj la alia same reagos kontraŭ mi, do tia reciproka agado neniam finiĝos. Sed en Ĉinio, se mi ne scias pri eksterlando, laŭ mia scio, neniu el la venkintoj en la historio ne estis rigorema. Ni prenu ekzemplojn el la moderna historio. La imperiestroj de la komenca periodo de King-dinastio kaj Juan Ŝikaj post la dua jaro de fondiĝo de la Ĉina Respubliko ja forpelis kaj ekstermis ĉiun el siaj malamikoj. Nur sur iliaj lipoj estis paroloj pri grandanimeco kaj indulgemo kaj eĉ pri kompatemo kaj bonkoreco, alie ol ĉe Lenin, kiu parolis per vortoj rektaj kaj klaraj. Lenin finfine estis ruso, kiu diris rekte tion, kion li pensis, multe pli malkaŝema ol ni ĉinoj. Fakte eĉ en Ĉinio, ĝis nun, inter tiuj, kiuj posedis belan renomon de grandanimeco, indulgemo, kompatemo kaj bonkoreco, ĝenerale malsukcesis homoj, kiuj pratikis ilin kaj en parolo kaj en ago kaj sukcesis tiuj kiuj praktikis nur en parolo. Tamen, ili trompis grandan nombron da stultuloj, kiuj ilin kredis.

La celebrado havas nenion komunan kun la revolucio, kaj ĝi estas maksimume nur ia ornamo. Estas bona afero certe, ke multas homoj, kiuj celebras, prikantas pri kaj ebriiĝas pro la revolucio. Sed kelkfoje tio facile kondukas la revolucian spiriton al vantemo. Kiam la revolucia forto kreskas, kreskas ankaŭ la nombro de revoluciuloj. Mi timas, ke post la unuigo de la lando eĉ la "studo"-kliko[10] partoprenos en la revolucio. Ĉu ne estas vere, ke la "Moderna Revuo"[11] ŝanĝis la principon en sia argumentado en la fino de la pasinta jaro? Kompare kun ilia argumentado en la okazo de la "tragedio de la 18-a de marto" mi ja supozas, ke ili ĉiuj akiris ian miraklan medikamenton kaj per tio subite ŝanĝiĝis karne kaj oste en aliajn estaĵojn. Mi havas antaŭjuĝon pri la budhisma religio. Mi opinias, ke hinajano karakterizata de asketismo estas vera budhismo. Kiam riĉuloj kaj potenculoj, kiuj vivas diboĉe nedetenante sin de alkoholaĵo kaj viando, praktikis nur unufoje vegetarismon kaj jam sin nomas *"ĝuŝi"*[12] kaj kalkulas kiel kredantojn, kvankam sub la bela nomo de mahajano[13], tiel ke la religio disvastiĝos pli vasten, tamen tiu religio fariĝos frivola aŭ eĉ egala al nulo, ĉar oni tre facile povas fariĝi ĝiaj

kredantoj. Tiel same estas al la revolucio. La en malfaciloj penantaj atakantoj marŝas antaŭen. En la vasta regiono de ili postlasita kaj baptita per revolucio, ni povas senzorge kanti kaj krii por tiel montriĝi ankaŭ kiel revoluciuloj, sed tio fakte havas nenion komunan kun la revolucio. Se tiaj homoj plimultiĝos, la revolucia spirito vantiĝos, maldensiĝos kaj perdiĝos. Pli poste restariĝos la malnovaĵo.

Guangdong estas loko de origino de la revolucio, kaj tiel ĝi la unua fariĝas ĝia postfronto kaj pro tio ĝi la unua alfrontos la danĝeron supredíritan.

En tiu ĉi tago por granda soleno mi kuraĝas dediĉi tiujn ĉi fuŝ-metitajn vortojn al la revolucia amaso en Kantono. Mi tre esperas, ke oni ne malbonhumoriĝos pro tiuj elreliĝintaj vortoj, ĉar estos ankoraŭ multaj tagoj por fari riparojn. Se oni tamen malbonhumoriĝos pro tio, tiam tio estos pruvo, ke la revolucia spirito jam frivoliĝis.

---

**NOTOJ**

1. *Tiu ĉi artikolo aperis en la felietona rubriko "Nova Elirejo" n-ro 11 de la ĵurnalo "Nacia Novaĵo" de Kantono eldonita je la 5-a de majo, 1927. Ĝi estis trovita antaŭ nelonge de la biblioteko de Ĝongŝan-Universitato.*

2. *Temas pri tio ke sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj en kunagado kun la Norda Ekspedicio, la laboristoj en Ŝanhajo sukcesis en sia tria armita leviĝo en la 22-a de marto 1927 kaj okupis Ŝanhajon, kaj ke la trupoj de la Norda Ekspedicio konkeris Nankinon en la 24-a de la sama monato.*

3. *En la 8-a de aprilo Lusin faris paroladon en la Huangpu-a Militlernejo laŭ ties invito, sub la temo "La literaturo en tempo de revolucio".*

4. *Post kiam la armita leviĝo de Vuĉang en la 10-a de oktobro sukcesis en la Revolucio de 1911 sub la gvido de Sun Jatsen, multaj provincoj favore reagis kaj proklamis sian forlason de la reĝimo de King-dinastio. En la l-a de decembro de la sama jaro la revolucia armeo konkeris Nankinon.*

5. *Ĝang Hjun estis unu el la nordaj feŭdaj militaristoj. Li iam servis kiel oficiro sub la reĝimo de King-dinastio kaj organizis obstinan reziston en Nankino dum la Revolucio de 1911, sed estis fine venkita. En septembro de 1913 li denove milit-akiris Nankinon dank' al la subteno de Juan Ŝikaj, ĉefo de nordaj militaristoj.*

6. *Li Ŝoŭĉang estas alinomo de Li Daĝaŭ. Li estis arestita de Ĝang Zuolin, militaristo de la nord-orienta kliko, en Pekino la 6-an de aprilo 1927, kaj estis mortigita en la 28-a.*

7. *La periodaĵo estas "Avangarda Junulo" n-ro 8, aperigita en la 11-a de novembro 1926 en Kantono. Tiu periodaĵo estas dek-taga gazeto eldonita kiel organo de la Guangdong-regiona Komitato de la Ĉina Komunista Junulara Ligo sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio.*

8. *Tiuj ĉi vortoj de Lenin estis cititaj de Stalin en lia verko "Pri Lenin" (parolado ĉe vesper-kunveno de la lernantoj de la Kremla Militlernejo en la 28-a de januaro, 1924).*

9. *Temas pri la artikolo "La praktiko de 'fair play' devas esti prokrastata" verkita de Lusin en la 29-a de decembro, 1925.*

10. *La "studo"-kliko estis reakcia politika organizo, kiu apogis la regadon de la nordaj militaristoj. En la periodo kiam Li Juanhong estis prezidanto de la norda militarista registaro kaj Duan Kijuj ĝia ĉefministro, grupo da reakciaj politikistoj estrata de Liang Kiĉaŭ kaj Tang Hualong organizis "Asocion por Studo de la Konstitucio", markis sin per studo de la konstitucio, sin kroĉis al Duan Kijui kaj spekuladis en politiko.*

11. *"Moderna Revuo" estis semajna gazeto eldonata de grupo da verkistoj kaj profesoroj de kompradora burĝaro, inter kiuj estis Hu Ŝi, Ĉen Juan kaj Hju Ĝimo. En la 18-a de marto 1926, Duan Kijuj ordonis buĉi patriotan amason en Pekino. Tiu gazeto malkaŝe kalumniis la mortigitojn kiel "perfortulojn" kaj pledis por la ekzekutisto Duan Kijuj. En la dua duono de la jaro 1926, kiam la milito de la Norda Ekspedicio venke disvolviĝis, la sama gazeto ŝanĝis sian tonon volante spekule aliĝi al la revolucio. Post la kontraŭrevolucia puĉo fare de Ĉiang Kajŝek en aprilo 1927, tiu gazeto turnis sin por servi al li.*

12. *"Ĝuŝi" estas budhismano, kiu sekvas tiel aŭ ĉi tiel budhajn instruojn, ne forlasante sian hejmon de ordinara vivo.*

13. *Mahajano kaj hinajano estas du skoloj de budhismo. Lusin uzis ĉi tie la nomon mahajano por aludi metafore la diversajn spekulantojn, kiuj enŝteliĝis en la revolucian tendaron kaj frivoligis la revolucian spiriton. Per tio li klarigis, ke Guangdong povas esti "loko de origino de la revolucio" sed ankaŭ povas esti tiu de kontraŭrevolucio.*

# Por pli alta kvalito de produktoj

de **TIAN CUN**

ĈIUFOJE kiam muzika programero finiĝis en teatro, kaj vi entuziasme aplaŭdis pro la prezentado, ĉu vi iam ekpensis, ke dum la arto de la muzikistoj estas vere admirinda, la muzikiloj en iliaj manoj same meritas laŭdon?

Ankaŭ mi ne estis atenta al tio. Sed kiam mi estas aŭskultinta rakontojn pri la laboristoj de la Tiangin-a Muzikila Fabriko, kiuj energie klopodas por plibonigi la kvaliton de siaj produktoj, mi profunde sentas, ke ne nur la muzikiloj estas laŭdindaj, sed ankaŭ la laboristoj, kiuj fabrikis tiujn muzikilojn, precipe devas esti admirataj kaj respektataj.

Povas esti, ke niaj estimataj esperantistoj-amikoj aŭ tiuj en via ĉirkaŭaĵo posedas akordionon, violonon aŭ blov-instrumenton fabrikitajn en Ĉinio, kun la fabrik-marko "Papago". Ili estas ĝuste produktoj de la Tiangin-a Muzikila Fabriko. Permesu, ke mi prezentu ĉi tie kelkajn rakontojn pri okazintaĵoj en tiu fabriko.

Iun tagon antaŭ kelkaj jaroj la fabriko ricevis leteron de laboristo de la Ŝanhaja Ŝtal-tuba Fabriko, kiu skribis, ke li kaj lia edzino ambaŭ ŝatas muzikon kaj ili kun ĝojo aĉetis akordionon kun la fabrikmarko "Papago". Ili ne atendis, ke post nelonge la supraĵo de galvanizita parto de la blovilo iom defrotiĝis kaj ke sur iuj anĉoj aperis rust-makuletoj. Tiu letero elvokis seriozan atenton ĉe ĉiuj en la fabriko, kaj ili tuj petis tiun laboriston resendi per poŝto la akordionon por riparo, ŝanĝo aŭ repago. Post kelka tempo, kiam la laboristo preterpasis Tiangin, la fabriko speciale invitis lin por ke li prezentu siajn opiniojn en kunveno de la laboristoj kaj oficistoj.

Depost tio, tiu fabriko ofte sendis siajn laborantojn al diversaj lokoj tra la tuta lando por informiĝi propra-iniciate pri la opinioj de la uzantoj de ĝiaj muzikiloj. Kiam ili aŭdis, ke iu uzanto en Pekino kritikis la kvaliton de unu el la muzikiloj de ili produktitaj, ili petis lin veni al la fabriko por fari konsilojn. En la komenco ili ne sukcesis venigi lin. Kiam ili invitis lin la duan fojon, li denove rifuzis. Por la triafoja invito la fabriko sendis siajn gvidanton kaj malnovan laboriston por klarigi sian sinceran intencon. Tiam la uzanto konsciis sian devon

*Gvidantoj de la fabriko ekzamenas produktaĵon.*





*Muntado de trumpeto*

helpi la fabrikon plialtigi la kvaliton de ĝiaj produktoj, kaj volonte venis al la fabriko.

La Tiangin-a Muzikila Fabriko konstante enketis la opiniojn de la uzantoj per diversaj rimedoj, por ke iliaj produktoj estu plibonigitaj. Multajn similajn aferojn mi aŭskultis en la fabriko. Respondeculoj kaj laboristoj de tiu fabriko diris, ke la senĉesa plibonigo de la kvalito de la muzikiloj kun la fabrik-marko "Papago" estas nedisigebla de la prizorgo kaj helpo de la uzantoj.

Iu laboranto de la fabriko ankaŭ rakontis al mi la naskiĝon de la ĉin-stila kvin-valva trumpeto. Li diris, ke tio estas frukto de la kunlaboro de la laboristoj, teknikistoj kaj multaj fame konataj ĉinaj muzikistoj.

La okazaĵo komenciĝis en 1971. Tiam Han Hianguang, instruisto de la Ŝanhaja Konservatorio kaj ludanto de trumpeto, venis al la Tiangin-a Muzikila Fabriko por aĉeti kvarvalvan trumpeton. La laboristoj petis lin tuj provi ĝin kaj elmeti siajn opiniojn. Maljuna Han diris, ke tiu trumpeto havas malpli vastan diapazonon kaj malpli varian tembron, kaj ke estus pli bone, se oni povus aldoni unu valvon. Parolante li faris skizon sur la tero. La sekvanta tago estis ferio. Tamen Ju Fuhiang, malnova laboristo, venigis al si kelkajn aliajn laboristojn kaj rapide elfaris kvin-valvan trumpeton laŭ la skizo de Han. La trian tagon, kiam la laboristoj enmanigis al li tiun trumpeton, li tute ne sciis, kion li devas diri al ili. Kiam li estis ludinta ĝin, li sentis, ke ĝi havis pli vastan diapazonon kaj ankaŭ la kvalito de la tembro pliboniĝis. La fabriko sendis malnovajn laboristojn al Pekino kune kun k-do Han, kaj multaj ludantoj de trumpeto estis invititaj por ekspertizi la novan produkton. Post 16-fojaj revizioj oni konstatis, ke tiu ĉi nov-tipa trumpeto fine atingis avangardan nivelon rilate al ĝiaj tembro, sonkvalito, strukturo kaj aer-trafluo. Dum la provfabrikado Ju Fuhiang kaj aliaj laboristoj sendis fojo post fojo la provfaraĵojn al Pekino, kaj Han Hianguang kaj aliaj muzikistoj atenteme konsultis koncernan materialon kaj faris skizojn. Kelkfoje li mem veturis al Tiangin en sia libertempo por interkonsiliĝi kun la laboristoj pri plibonigo.

Ankaŭ la tri-valva trumpeto de tipo 708 kaj la granda kontrabaso produktitaj de tiu fabriko estis fabrikitaj sub la aktiva kunlaboro de multaj ŝtataj orkestroj.

Se vi malmuntas muzikilojn kun la fabrikmarko "Papago" produktitajn de tiu fabriko, vi povas klare vidi, ke sur ĉiu parto estas stampitaj arabaj ciferoj. La laboristoj de tiu fabriko nomas tiujn ciferojn "labor-numeroj". Ili kutime stampas siajn "labor-numerojn" sur la partoj, kiujn ili mem faris aŭ ekzamenis, por montri sian respondecon. Kiam la gvidantoj de la fabriko iras al la laborejo kaj partoprenas en laboro, ankaŭ ili stampas siajn proprajn "labornumerojn" sur siaj produktoj.

Foje Li Baŭjong, juna laboristo, atenteme finkontrolis kiel kutime ĉiun sonon de unu akordiono, kaj tiam li povis laŭregule stampi sian "labor-numeron", ĉar li jam plenumis sian taskon. Sed juna Li havas la kutimon prove ludi la akordionon post muntado. Kian strangaĵon li trovis! Kial ĝi sonis tiel obtuze? Li faris riparon, sed ĝi ankoraŭ ne sonis sufiĉe forte. Li manovris plurfoje, tamen la rezulto ankoraŭ ne estis konten-

tiga. Tio estis ja eksterordinara problemo por juna Li. Kion li devis fari? Laŭ sia respondeco li devis nur garantii la kvaliton de ĉiu aparta sono, kaj li ne bezonis zorgi pri aliaj aferoj. Sed tio, kion Li Baŭjong estis nun pripensanta, estis, ke ilia fabriko estas socialisma entrepreno kaj la laboristoj estas mastroj de tiu entrepreno, kaj tial li devas definitive garantii la bonan kvaliton de la produktoj. Li studis kaj restudis, konsultis malnovajn laboristojn kaj finfine trovis la difekton ĉe la subtenilo de la kovrilo de la aerfluejo. Post zorgema reĝustigo la kvalito de la akordiono tute atingis la difinitan normon, kaj nur tiam juna Li respondeceme stampis sur ĝi sian "labornumeron".

Por garantii la altan kvaliton de siaj produktoj la Tiangin-a Muzikila Fabriko starigis konsiderinde perfektan sistemon de kvalita kontrolo. Krom la "respondeco pri kvalito per labornumero" tiu sistemo inkluzivas tiajn principojn kiel "mem-kontrolo", "reciproka kontrolo" ktp. Kiel mastroj de sia patrio pozitive konsciaj pri sia respondeco, la laboristoj zorgeme prilaboras ĉiun parton de la muzikiloj kaj ĉiam strebadas al pli alta nivelo. Ili diris: "Ni estas respondecaj pri niaj produktoj ĝis ĉiu detalo, kaj ni ĉiam estas pretaj ricevi ekzamenon de nia popolo."

Mi ankaŭ aŭdis alian rakonton, kiu montris kiel serioze ili respondecas pri siaj produktoj eĉ post kiam tiuj jam estis senditaj al la merkato.

Foje unu el la fakoj por eksterlanda komerco sciigis al la fabriko, ke kelkaj el la akordionoj eksportotaj difektiĝis. La fabriko tuj sendis sian laboranton al Kantono por repreni tiujn akordionojn. Post esplorado oni trovis, ke la bas-butonoj eniĝis pro interpuŝiĝo dum transportado. Tiu akcidento elvokis atenton de ĉiuj laboristoj de la fabriko. En la pasinteco oni zorgis nur pri la taŭga pakado de la muzikiloj por gardi tiujn kontraŭ interpuŝiĝo. Nun oni ekturnis sian atenton al la muzikiloj mem. La fabriko organizis la laboristojn kaj teknikistojn por interkonsiliĝo. Ili faris ŝanĝojn kaj aldonis malgrandan kontraŭ-skuan tabuleton. Poste ili faris multfoje detruajn provojn kaj ne trovis similan difekton al la akordionoj.

La problemo rilate al la reprenitaj akordionoj kaj la estonte produktotaj akordionoj jam estis solvita. Sed kion oni devas fari kontraŭ la 3,000 akordionoj, kiuj estis ekspeditaj al staplejo por eksporto? Iuj opiniis, ke tiuj akordionoj ekspeditaj estis ĉiuj laŭnormaj, kaj krome, ne okazis la sama difekto, tial ili ne bezonis ĝeni sin en tio. Sed la plejmulto el la laboristoj diris, ke la ĉinaj produktoj en eksterlando reprezentas la novan, socialisman Ĉinion, kaj sekve ili devas esti respondecaj pri la kvalito de siaj produktoj ĝis la fino. Agante laŭ ilia opinio la fabriko speciale sendis laborantojn al la staplejo de eksporto por fari al tiuj akordionoj samajn ŝanĝojn kaj aldonis kontraŭ-skuajn tabulojn.

Aŭdinte tiujn rakontojn mi ĉiam sentis specialan emocion, kiam ajn mi ekvidis muzikilojn kun la fabrik-marko "Papago" en la manoj de la muzikistoj sur scenejo post la kurten-leviĝo. Dum mi aŭskultis la prezentadon, mi emis rememori, kion la laboristo Ju Fuhiang diris kiam mi laŭdis la muzikilojn: "Tia atingo estas nur nova komenco. Kiel mastroj de nia patrio ni ne havas la rajton halti duon-voje, kaj ni devas strebi antaŭen por plua plibonigo."

*Veterana kaj juna laboristoj kune klopodas por altigi kvaliton de produktajoj.*



GONG JING:

# Feliĉa vivo de maljunuloj

— Vizito al la Tiangin-a Hejmo de Emeritoj

Iun frumatenon de la aŭtuna komenco, mi venis al la Tiangin-a Hejmo de Emeritoj laŭ larĝa asfalta strato.

En la institucio estas multaj verdaj arboj kaj ĉie regas pureco, bonordeco kaj agrabla atmosfero. Gvidate de ĝia respondeculo kamarado Jang Ŝaŭhian, mi iris vidi gemaljunulojn. En varmeta sunbrilo, iuj el la gemaljunuloj absorbite ludis ŝakon sidante ĉirkaŭ tabloj, aliaj akvumis florojn en vazoj orde vicigitaj en la korto, triaj legis librojn aŭ ĵurnalojn, kaj kvaraj aŭskultis radiajn programerojn. Ili en puraj vestoj aspektis viglanime kaj salutis nin afable.

Kamarado Jang diris al mi: "En nia socio ĉiuj maljunuloj estas respektataj. Tiuj, kiuj havas gefilojn, vivas bone, kaj ankaŭ la aliaj, kiuj ne havas gefilojn, ĝuas feliĉan vivon en siaj lastaj jaroj. La konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko kondiĉas, ke ĉiu civitano, kiam li aŭ ŝi estas maljuniĝinta, malsaniĝinta aŭ perdinta sian laborkapablon, havas rajton ricevi materian helpon. Senhelpaj gemaljunuloj estas vivtenataj de la popola registaro. En multaj urboj oni starigis hejmojn kaj sanatoriojn de maljunuloj. En la kamparo tiaj gemaljunuloj estas garantiataj de la kolektivo en manĝaĵoj, vestoj, hejtaĵoj kaj sepultado. Multaj popolaj komunumoj starigis hejmojn de maljunuloj. Dank' al tio senparencaj gemaljunuloj, kiuj perdis laborkapablon, ĝuas feliĉan vivon en siaj lastaj jaroj. Nia maljunula hejmo fondiĝis en la jaro 1958. Ĉiujare la ŝtato donas al ĝi subvencion de 40,000 juanoj. En la pasintaj kelkaj jaroj ĝi akceptis pli ol 360 maljunajn emeritojn. Nun ĉi tie loĝas 86 gemaljunuloj, kies meznombra aĝo estas 75 jaroj kaj el ili la plej aĝaj havas jam pli ol 90 jarojn. Ili nun vivas en prizorgado de la Partio kaj la registaro. Por eniri en la maljunulan hejmon ĉiu maljunulo devas prezenti sian peton kaj esti rekomendita de la oficejo aŭ entrepreno en kiu li laboris kaj konsentita de la maljunula hejmo."

## I

En la larĝaj kaj helaj dormoĉambroj vatitaj kaj lanaj litkovriloj bonorde kuŝas sur la litoj, kaj sur tabloj troviĝas vazoj kun floroj, fruktoj kaj aliaj ĉiutagaj bezonaĵoj.

La maljunuloj ĝoje rakontis al mi pri ilia vivo. Ili nomas la institucion feliĉa domo. Laŭ la difino de la ŝtato, la gemaljunuloj ĉiumonate ricevas pension de 70% de sia antaŭa salajro. Ili ĝuas senpagan kuracadon kaj loĝadon en la institucio kaj ilia elspezo estas nur por iliaj manĝaĵoj, vestoj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj. Reprezentantoj de la gemaljunuloj partoprenas en la administrado de la manĝejo, kiu ofte preparas diversajn apetitvekajn manĝaĵojn por ili. En la festaj tagoj la institucio plezurigas la maljunulojn per apartaj tradiciaj manĝaĵoj. Kontraŭ malmulta pago ili ricevas bonan zorgon. Multaj gemaljunuloj deponas sian nebezonatan monon en banko. Ankaŭ iliaj amuzoj estas riĉaj. Krom filmoj kaj televido, la maljunula hejmo starigis amuzan ĉambron, kie la maljunuloj povas ludi ŝakon, goon kaj kartojn. Krome, geknaboj ofte venas por prezenti al ili diversajn artajn programerojn. La maljunuloj ankaŭ ricevas apartan prizorgon de la socio. Barbiroj ĉiusemajne



*En interparolado pri la nuna vivo kaj la pasintaĵo*

venas al ili por tondi aŭ razi harojn kaj banejaj servistoj ofte kuracas por ili piedmalsanon. Komizoj de magazeno periode alportas al ili ĉiutagajn bezonaĵojn. La respondeculoj de la Tiangin-a Buroo de Civilaj Aferoj kaj koncernaj unuoj en festotagoj alvenas al la hejmo por vidi kaj konsoli ilin.

Iu maljunulo rakontis al mi jenan epizodon: En la kuranta jaro, unu el la liberigitaj militaj krimuloj per speciala amnestio Caŭ Ĝonglin, antaŭa estro de la Kuomintanga Tiangin-a Buroo de Civilaj Aferoj, vizitis la maljunulan hejmon. Kiam li aŭskultis la rakontojn de la maljunuloj pri mizeraj travivaĵoj antaŭ la Liberiĝo kaj la hodiaŭa feliĉa vivo, li mallevis sian kapon pro honto. En la malnova Ĉinio la reakcia registaro de Ĉiang Kajŝek neniam zorgis pri la vivo de la popolo, eĉ la malgrandaj monsumoj asignitaj por "filantropia afero" estis enpoŝigitaj de la oficistoj de civilaj aferoj, kaj la senhelpaj maljunuloj povis nur fariĝi stratai vagabondoj kaj morti en frosto kaj malsato. . . Vidante la feliĉan vivon de la maljunuloj en la institucio, Caŭ Ĝonglin diris kun bedaŭro: "La malnova Buroo de Civilaj Aferoj ne zorgis pri la senhelpaj gemaljunuloj kaj mi estis kulpa en tio." Maljunulino Ŝen Hifan, kiu vivis 17 jarojn en la institucio, diris: "En la malnova hommanĝa socio, la sorto de grandaĝuloj senhelpaj estis plej kompatinda. Tiam la maljunaj laboruloj malfacile povis eviti mizeron eĉ se ili havis gefilojn. Mi neniam forgesos kiel mia patro mortis. Li laboris 40 jarojn por bienulo kiel jardungito, sed ne povis satigi sin per brano kaj herboj kaj suferis ĉian turmentadon. Kiam mi estis 11-jara, mia patro estis forpelita de la senkora bienulo pro lia kadukiĝo. Li devis forfuĝi almozpetante al la Nordoriento kaj frostmortis poste en dezerto. . . Nun mi jam estas 77-jara, kaj vivas feliĉe kun forta sano kaj vigla animo. Tial mi estas ĉiam kontenta pri ĉio hodiaŭa."

Ĉe tio la maljunulino kun larmoj daŭrigis: "En la malnova socio neniu zorgis pri ni, dum en la nova socio, ju pli ni vivas, des pli ni reiuniĝas. La malnova kaj nova socioj ja estas tute malsamaj, vere plej bona estas la socialisma socio!"

La maljunuloj fiere diris al mi, ke ili akceptis nemalmultajn geamikojn venintajn el diversaj landoj. En 1975 sola ili jam akceptis 799 fremdlandajn gastojn. La feliĉa vivo de la gemaljunuloj profunde kortuŝis kaj ĝojigis la gastojn.



*En legado de ĵurnalo*



*Korpoekzameno*

## II

Pro suferoj en la malnova socio nemalmultaj el la gemaljunuloj suferas de malsanoj kaj iuj eĉ kuŝas tutjare sur lito. Firme tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ **"tutkore servi al la popolo"**, la laborantoj de la maljunula hejmo zorgeme flegas la maljunulojn kun profunda sentimento de la proletaro.

Pri tio la maljunuloj aparte laŭdis la 22-jaran kuracistinon kaj membron de la Komunisma Junulara Ligo Vang Ĝongji, kiu diligente studas kuracarton kaj varmkore servas al la maljunuloj, kaj ili laŭdis ankaŭ flegistinon Li Guangping.

83-jara Li Junbo paraliziĝis pro alta sangpremo kaj ne povis stari, nek paroli, kaj longtempa prenado de medikamentoj kaj akupunkturo ne efikis al li. Kuracistino Vang tre maltrankviliĝis pri tio kaj iris serĉi receptojn en hospitaloj kaj konsulti spertajn kuracistojn, tamen ili diris, ke la malsano estas malfacile kuracebla. Sed Vang ne retiriĝis. Post ripetada ekzameno kaj esplorado pri lia malsano, ŝi decidis daŭre fari al li akupunkturon. Por trovi efikan pikpunkton la juna kuracistino unue faris eksperimenton sur sia korpo kaj poste akupunkturon al avo Li kaj atingis bonan efikon. Avo Li, kiu sentis en la pasinteco malfacilecon en trinkado, nun povas movi siajn membrojn kaj preni manĝon per si mem. Dank' al atenta kuracado de Vang Ĝongji, multaj malsanuloj resaniĝis. Serena avino Lin Ĵujing eniris en la maljunulan hejmon antaŭ 3 jaroj subtenate de aliuloj. Nun ŝi loĝas en supra etaĝo de la domo kaj iras per facilaj paŝoj, kvazaŭ ŝi ne estus maljunulino.

Li Guangping estas flegistino laborinta preskaŭ 10 jarojn. Ŝi aktive servas al la gemaljunuloj, timante nek malpuron nek laciĝon, kaj ricevis iliajn laŭdojn. Avo Vang Baŭlin ne povas regi sian fekadon kaj urinadon. Flegistino Li Guangping do ĉiamaniere klopodas por ke li ricevu ĝustatempan vestoŝanĝadon kaj ne malvarmumiĝu. Avo Vang ĉiutage dormas komforte kaj varme kaj pro tio tre dankas ŝin.

Avo Lu Hiangbo suferis de grava malsano. Flegistino Li zorgis lin kiel sian karulon kaj helpis lin preni medikamentojn kaj manĝaĵon, kio kortuŝis avon Lu ĝis larmoj. Avo Lu diris: "Mi vivis preskaŭ 90 jarojn en pluraj dinastioj, en kiuj mi ĉiam estis ekspluatata kaj neniu zorgis pri mi. En la pasinteco oni diris, ke la gefiloj estas la plej karaj, sed nun mi opinias, ke la laborantoj edukitaj de Prezidanto Maŭ estas la plej karaj." Kiu el la gemaljunuloj ne ĝojas pro tio ke ili povas pasigi siajn lastajn jarojn en tia bona epoko!

## III

*Mi brave iras al batalo kun skribil' en mano,*
*blankhara mi fidelas ja al la revolucio.*

*Kvankam maljuna kaj povanta nur mallerte legi*
*mi sturmas en kritiko kontraŭ Lin kaj Konfucio*
*kaj en lernado de revolucia teorio.*

Jen poemo verkita de maljunulo Vang Ĝiheng.


En la institucio la gemaljunuloj ofte diras: "lerni ĝis la lasta spiro" kaj "kontribui laŭeble al la socio". Kvankam ili ĉiuj estas grandaĝuloj, sed neniu volas esti postiranta en lernado de revolucia teorio kaj kritiko kontraŭ kapitalismo kaj reviziismo. Multaj el ili abonas jurnalojn kaj gazetojn. Ili diras: "Kvankam ni emeritiĝis, tamen nia penso ne devas emeritiĝi. Ni devas diligente lerni kaj zorgi pri la aferoj de la ŝtato."

La maljunuloj ofte faras al junaj laboristoj, oficistoj kaj lernantoj raportojn pri la amara vivo en la malnova socio kaj la nuna feliĉa vivo kaj okazigas ekspozicion de klasa eduko per siaj sangaj historioj familiaj, por ke ili ne forgesu la suferojn de sia klaso kaj daŭrigu la revolucion. En la pasinta jaro sola ili jam faris raporton al pli ol 6,000 lernantoj de 49 lernejoj.

Iun fruan matenon, mi vidis iun maljunulinon puriganta ŝtuparon kaj diris al ŝi: "Vi jam estas tiel grandaĝa kaj tamen ankoraŭ tiel laborema." Ŝi diris ridetante: "Al aĝuloj fizika laboro estas utila, sen laboro ni estas facile atakataj de malsanoj." Kamarado Jang diris al mi: "Tiuj maljunuloj kutimiĝis al fizika laboro de sia infaneco kaj ne povas resti senfare. Ili diris: 'La ŝtato donis al ni tiel bonan zorgon, kiel ni povas ĝui ĉion ĉi tion senfare? Ankaŭ ni devas kontribui nian malgrandan forton al la socialisma konstruado.' " En la frukt- kaj legom-ĝardenoj zorgataj de la laborantoj de la institucio, oni povas vidi ofte la maljunulojn tie akvumantaj, ŝprucigantaj insekticidon kaj sarkantaj herbaĉojn. Ili opinias ke tiuj laboroj povas fortigi ilin. En rikolta sezono, sur arboj de pomoj, persikoj, vinberoj kaj jujuboj abunde pendas fruktoj. La ĉijare rikoltitaj vinberoj sole jam atingis 2,000 kg. Manĝante la freŝajn memrikoltitajn fruktojn la maljunuloj sentas ĝojon en la koro.

Pro la viditaj kortuŝaj scenoj mia koro longe ne povis kvietiĝi.


*En biblioteko*




# La tradicia farmacio de pakistano en disvolviĝo

de la Esplora Grupo de Drogherboj de la Ĉina Akademio de Sciencoj


En aŭgusto de 1975, kun amikeco de la ĉina popolo al la pakistana popolo ni vizitis la Islaman Respublikon de Pakistano kaj ricevis varman bonvenigon de ĝiaj registaro kaj popolo.

Dum la vizitado Ĉefministro Zulfikar Ali Bhutto akceptis nin kaj havis kun ni intiman interparolon. Li montris grandan intereson pri la ĉina medicino kaj alte taksis ĝin. Iu ministro de la provinco Punjab diris al ni dum la akceptado: "Kien ajn vi iros vi estos bonvenigataj, ĉar la pakistana popolo rigardas vin kiel siajn proprajn homojn."

Ĝuste kiel diris tiu ministro, ĉu en urboj aŭ en malproksimaj vilaĝoj ĉie oni amike nin akceptis. Ili laŭte kriis en urduo, la nacia lingvo de Pakistano, "Ĉinio". Iuj el ili diris al ni en la ĉina lingvo "saluton" kaj "ĝis revido". Kiam ni venis al Lahore kaj Peshawar, tieaj amikoj metis girlandojn ĉirkaŭ niajn kolojn kaj okazigis kunvenojn por nin bonvenigi. En Islamabad ni rigardis la "amikecan arbon"—sapion *(Sapium sebiferum)* plantitan de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj fotiĝis apud ĝi kun multaj pakistanaj amikoj.

La pakistanaj amikoj de medicino tre zorgis nin kaj entuziasme konigis al ni la historion de la pakistana medicino. Antaŭlonge Pakistano jam havis sian tradician farmacion. Frue antaŭ la Kristnasko iliaj praavoj jam skribis multajn medicinajn verkojn en urduo kaj akumulis valoran sperton. Sed post kiam Pakistano fariĝis kolonio en la mezo de la 18-a jarcento, ĝia tradicia medicino estis forte tretata. Iu ministro diris al ni: "Antaŭ invado de imperiismo niaj drogherboj estis multe uzitaj en kuracado. Tamen por dumpingi siajn medikamentojn la koloniaj regantoj malpermesis al ni uzi niajn drogherbojn, premis niajn kuracistojn kaj eĉ dehakis iliajn manojn, por ke ili ne povu plenumi medicinan servon." Sed neniu ajn forto povas ruinigi la trezorejon de la pakistanaj tradiciaj medicino kaj farmacio, kiuj jam fariĝis la ĉefa kuraca rimedo por la popolanoj en la kamparo kaj montregionoj.

*La ĉinaj medicinaj laborantoj kaj pakistanaj kolegoj en Islamabad.*



Post sia sendependiĝo Pakistano senĉese disvolvas sian tradician farmacion samtempe kun la disvolvo de la nacia ekonomio. Nun utiligante la riĉfonton de siaj propraj drogherboj Pakistano solvas sian medicinan problemon kun la spirito de sinapogo sur propraj fortoj.

Nun Pakistano jam fondis la tutlandan komisionon de la tradicia

medicino kaj starigis institutojn de tradicia medicino kun lernotempo de 4 jaroj en Lahore, Karachi Peshawar, Hyderabad kaj Rawalpindi. En la lastaj kelkaj jaroj ĝi malpermesis praktikadon de ekzorcistoj, kulturis, ekzamenis kaj sankciis pli ol 30,000 kuracistojn de tradicia medicino en urboj kaj kamparo, por ke ili bone servu al la popolo en diversaj lokoj. Tiu komisiono kolektis ĉirkaŭ 30,000 receptojn, el kiuj ĝi elektis pli ol mil relative bonajn por ke kuracistoj provu uzi ilin en praktiko. Nun oni tradukas kaj eldonas antikvajn receptojn de Arabujo, Persujo kaj Ĉinio. Krome ili fondis kultivejojn de ofte uzataj drogherboj.


Nun la medicinaj esploraj institucioj de Pakistano prenas drogherbojn kiel ĉefan objekton de sia esplorado. La Higiena Instituto de Pakistano faras esploradon al drogherboj de la tuta lando kaj elektas drogherbojn efikajn en kuraco de hepatito, koronaria kormalsano, poliomjelito kaj kancero. Iuj esploraj institucioj de medikamentoj en Karachi, Peshawar kaj Lahore klopodas por trovi drogherbojn efikajn en kuraco de alta sangpremo, renalitiazo kaj en prevento de gravediĝo. La agronomia universitato Lyallpur pretas starigi esploran instituton de drogherboj kun la celo ordigi kaj plibonigi la tradiciajn medikamentojn.

Dum la vizitado ni konatiĝis kun nemalmultaj pakistanaj kolegoj. Prezidanto de la Esplora Komisiono de Sciencoj kaj Industrio de Pakistano D-ro Abdullah Khan trifoje veturis speciale al Karachi, Lahore kaj Peshawar por akompani nin en vizito de institucioj sub tiu komisiono. Li sincere diris al ni: "Nia amikeco ne estas en vortoj, sed montriĝas en agoj. En malfacilaj tagoj vi ĉiam staris ĉe nia flanko kaj la amikeco inter ni estas provita de tempo." Lia perfekta zorgo al ni multe kortuŝis nin. Ni ankaŭ renkontiĝis kun kelkaj pakistanaj amikoj, kiuj vizitis Ĉinion, kaj sentis apartan intimecon. Ili deziris, ke la medicinaj laborantoj de ambaŭ landoj bone kunlaboru por kune progresi en tiu laboro.

Dum la vizitado ni kaj la pakistanaj amikoj lernis unu de alia kaj interŝanĝis sperton. Ni ellernis de pakistanaj amikoj multon pri uzado de drogherboj. Ni kune kontrolis terminojn, utilojn kaj uzadon de drogherboj kaj interŝanĝis sperton pri prognozo per la ĉina medicino. Ili konigis al ni kiel ili kuracas artriton per aŭtuna narciso, psikozon per valeriano kaj traheiton kaj venenon de vipuro per drogherboj, kaj ankaŭ drogherbojn uzeblajn por preventi gravediĝon kaj kuraci diabeton. En universitatoj, institucioj, farmaciejoj kaj vendejoj de drogherboj elmontriĝis granda kvanto da specimenoj de drogherboj kaj literaturo pri esploraj atingoj, kio multe helpis nian studadon kaj ni ellernis multan valoran sperton de la pakistanaj amikoj.




# Historiaj kulturaĵoj elfositaj en Hingiang



*Fajenca kruĉo de Tang-dinastio elterigita en antaŭa urbo Bejting*


EN Hingiang, kiu estas teritorio de Ĉinio jam de antikveco, loĝas multaj frataj naciecoj de nia lando. De generacio al generacio ili kune vivas kaj diligente laboras por ekspluati la landliman areon kaj kreis la historion de la patrolando. Tion atestas la abundaj historiaj kulturaj objektoj kaj postrestaĵoj ĝis nun konservataj.

En la antikveco Hingiang estis nomata en Ĉinio "Okcidenta Regiono". Frue en la periodo de la Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) oni jam faris notojn pri montoj, riveroj, grundo kaj loĝantaro de

Hingiang, pri kiuj ni legas en famaj antikvaj libroj de Ĉinio. En la unua jarcento a. K. Han-dinastio (206 a.K. - 220 p.K.) instalis tie reg-organojn por praktiki administran kaj militan potencon kaj postenigis tie terkulturantajn garnizonojn. De la finaj tempoj de Han-dinastio (ĝis 220 p.K.) ĝis Suj-dinastio (581-618) inkluzive, funkciis tie la sistemo de *gjun-hian* (administraj distriktoj: *gjun* pli granda ol kaj *hian* ekvivalenta al nuna gubernio de Ĉinio), kaj la areo tiam estis jam integriĝinta parto de nia lando. Tang-dinastio (618-907 p.K.) instalis tie pli superajn administrajn organojn kaj dividis la regionon en multajn subordigitajn administrajn distriktojn nomatajn laŭgrade: *fu, ĝoŭ* kaj *hian* kaj la tuta regata teritorio inkluzivis la nunan Pamiron kaj vastan areon oriente kaj sude de Balhaŝ-lago. Tion heredis daŭre ankaŭ la postaj dinastioj: Liaŭ (907-1125), Song 960-1279), Juan (1271-1368), Ming (1368-1644) kaj King (1644-1911). En 1883 King-dinastio klasigis Hingiang en sia administra sistemo kiel provincon.

En 1949, post la venko de la revolucia batalo de la ĉina popolo, la diversnaciaj popoloj de Hingiang sin liberigis el sub la reakcia regado de Kuomintango kaj en la 1-a de oktobro de 1955 fondiĝis la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

Post la Liberiĝo, precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio, la diversnaciaj arkeologiaj laborantoj de la aŭtonoma regiono, sub la direktado de la politiko **"servigi antikvajon al nuntempo"**, multe




*Enoficiga dokumento de Fan Deda de Tang-dinastio elterigita en Turfan*



*Silka pentraĵo de Tang-dinastio elterigita en Turfan*



*Dancistino de Tang-dinastio elterigita en Turfan*



*Brokato kun desegnoj pri ĉasado de Tang-dinastio, elterigita en la antaŭa urbo Bejting*

klopodis en enketado kaj esplorado kaj elfosis multajn valorajn historiajn objektojn kune kun tieaj popolanoj, inter kiuj troviĝas koloraj fajencaĵoj kaj ŝtona hakilo el periodo de neolitiko, bronza spegulo el la periodo de la Militantaj Regnoj (475-221 a. K.), skribaĵoj sur tabuletoj bambuaj kaj lignaj, bronzaj sigelilo kaj spegulo, brodata robo, plektita kesto kaj moneroj cirkulantaj tiutempe tra la tuta lando el Han-dinastio, manuskriptoj, oficialaj dokumentoj, diversspecaj silkaj kaj lanaj teksaĵoj lukse kaj fajne faritaj el dinastioj Vej (220-265) kaj Gin (265-420), oficialaj dokumentoj, silkaĵoj, koloraj fajencaj homfiguroj kaj pentraĵoj el Tang-dinastio (618-907), kupraj sigeliloj el Liaŭ-dinastio kaj porcelanaĵoj el Juan-dinastio kaj sigeliloj de ŝtatoficistoj el King-dinastio. Estas elfositaj ankaŭ multaj kulturaj objektoj, kiuj spegulas intimajn rilatojn de la hanoj kun la tieaj frataj nacimalplimultoj kaj iliajn kulturajn interŝanĝojn, ekzemple inter objektoj kune elfositaj en Turfan estas *ĝiaŭzi*, manĝaĵo de hanoj, kaj *nang*, ĉefa manĝaĵo de ujguroj. Estas elfositaj oficialaj dokumentoj el diversaj epokoj en la lingvoj de pluraj frataj nacimalplimultoj. Inter ili estas ĉefe la lingvoj *tufan, hujhe, janĉi, gujcĭ* kaj *hetian*.

Multaj el la historiaj objektoj grandakvante trovitaj en Hingiang estas tute similaj kaj kun komunaj karakterizaĵoj al samtempaj objektoj elfositaj en aliaj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj de lando. Tio montras, ke Hingiang jam antaŭlonge formis kune kun internaj lokoj de la patrolando unuecan tuton en politiko, ekonomio kaj kulturo. Kaj ankaŭ granda nombro da faktoj registritaj en historiaj literaturoj montras la nedisigeblecon de Hingiang al la interna parto de la patrolando jam de fora antikveco.

# Venko de Himen Baŭ super la artifiko de riverdia edziĝo

DE 424 ĝis 397 a.K. la regnestro Venhoŭ de la regno Vej komisiis la politikan reformon al la legalizistoj Li Kuj kaj Vu Ki kaj en tiu tempo Himen Baŭ estis promociita kiel guberniestro de Je. Tiam ankoraŭ tre potencaj estis la restaŭraj fortoj de sklavmastroj, kiuj tutforte propagandadis religion kaj mistifikis la popolon por subfosi la reformon. Himen Baŭ faris rezolutan batalon kontraŭ ili.

Iun vesperon post sia veno al la posteno, Himen Baŭ promenis apud la rivero Ĝang kune kun siaj subuloj. Estis julio. La rivero trembriletis en la hela lunlumo kaj regis silento. Subite aŭdiĝis ĉagrena ploro de maljunulo. "Kial tiel triste ploras maljunulo? Certe li estas trafita de malfeliĉo." Himen Baŭ venigis la maljunulon.

Pridemandite, la maljunulo diris kun granda indigno: "La edziĝo de riverdio multe suferigis nin."

Temis pri jena afero: Tra la gubernio Je fluis la rivero Ĝang kaj ĉiujare en somero kaj aŭtuno ĝi inundis post pluvego la kampojn kaj forportis homojn kaj brutojn de ambaŭ bordoj. Por elpremi monon de la popolo, la sklavmastroj-aristokratoj dissemis mensogon: "Jen koleriĝas la riverdio. Se ni ne svatus belan knabinon al lia moŝto, li inundus nian tutan gubernion." Tial ĉiun someron la ruzaj sorĉistinoj vizitis la familiojn de la gubernianoj unu post alia por serĉi belan knabinon, kaj se ili trovis iun knabinon belan ili deklaris, ke ŝi devas edziniĝi al la riverdio. Se filino de malriĉulo estis elektita, ŝi devis tuj konsenti la decidon. Unue oni konstruis apud la rivero provizoran preĝejon, aranĝis en ĝi ruĝajn kurtenojn kaj metis bovajon, vinon kaj aliajn oferajojn. Poste la kompatinda knabino devis esti banita, vestita per belaj silkaj vestaĵoj kaj loĝigita en la preĝejo por piiĝi. Post 10 tagoj, en la nuptofesto oni sidigis la knabinon en liton kaj poste metis ĝin sur la riveron. La lito kun la knabino flosis kelktempe kaj fine surfundiĝis. Tial, ĉiujare en la tempo de svato por la riverdio, la loĝantoj, kiuj havis filinon, ĉiuj forfuĝis kun siaj infanoj. Sekve de tio sovaĝiĝis la kampoj kaj akre malmultiĝis la loĝantoj. Sed la sklavmastroj-aristokratoj, la sorĉistinoj k. a. aĉuloj multe profitis. Ĉiujare sub la preteksto de edziĝo de la riverdio ili rabis de la popolo grandegan sumon da mono, el kiu nur malpli ol dekono estis uzita por la ritoj kaj la cetera parto estis proprigita de ili. Kaj malgraŭ tio la rivero inundis ĉiujare la lokon kiel antaŭe, kaj la popolo veadis pro la neeltenebla sufero.

La akuzo de la maljunulo meditigis Himen Baŭ. Li decidis subigi la malnovajn fortojn de sklavmastroj por garantii glatan praktikon de nova politiko pri disvolvo de agrikulturo.

En la tago de edziĝo de la riverdio, Himen Baŭ kaj liaj subuloj







venis al la riverbordo. La feston ĉeestis miloj da loĝantoj, dekkelkaj sorĉistinoj, loka estro kaj grandsinjoroj. Himen Baŭ diris al la ĉefsorĉistino: "Venigu la novedzinon de la riverdio, por ke mi vidu, ĉu ŝi estas bela." Post nelonge kelkaj sorĉistinoj alkondukis al li junulinon duonsvenan pro maldolĉa plorado. Ĵetinte al ŝi rigardon Himen Baŭ diris al la ĉefsorĉistino: "Tiu ĉi knabino ne estas bela. Bonvolu sciigi la riverdion, ke ni sendos iom poste kiam mi trovos pli belan." Lia vorto teruris la maljunulinaĉon. Himen Baŭ svingis la manon kaj liaj du sekvantoj tuj kaptis kaj ĵetis ŝin en la riveron. Post iom da tempo Himen Baŭ sin ŝajnigis maltrankvila kaj diris: "Kial ŝi ankoraŭ ne revenis? Nu, ŝiaj disĉiplinoj iru por urĝigi ŝin!" Kaj je lia diro alia sorĉistino estis ĵetita en la riveron. Poste oni ĵetis la trian, la kvaran . . . laŭ lia ordono. Himen Baŭ ankoraŭ ŝajnigis sin tre pia kaj silente rigardadis la ondetantan riveron. Poste lia rigardo turniĝis al la loka estro kaj ĉi tiu ektremis tutkorpe kaj klinis la kapon. Himen Baŭ diris al li: "La senditoj ĉiuj estas virinoj nelertaj en plenumo de la komisio. Pli bone estas, ke vi persone iru tien!" Kaj tiel ankaŭ la estro estis ĵetita en la riveron. Himen Baŭ staradis ĉe la rivero gravmiene kun klinita korpo, kvazaŭ li tre adorus la riverdion. Iom poste, li turnis sin al la ceteraj regnaj oficistoj kaj sorĉistinoj ŝtoniĝintaj de teruro: "Kiel gastama estas lia riverdia moŝto ke li restigis ĉiujn senditojn. Ĉu estas ne bone ke vi, sinjoroj sklavmastroj, iru tien por pridemandi la aferon?" Aŭdinte tion ĉiuj ili surgenuiĝis kaj senĉese riverencegis al Himen Baŭ por peti indulgon. Himen Baŭ rikanis: "Kial vi ne kuraĝas iri al la riverdio, se li vere ekzistas? Evidente vi nur volas trompakiri monon kaj sin riĉigi, malgraŭ ke tio terure suferigis la popolon. De nun, se iu ankoraŭ aranĝos edziĝon de la riverdio, mi unue ĵetos lin en la riveron por ke li faru anoncon." La aĉuloj tremadis senĉese kaj diris: "Ni plu ne kuraĝos, plu ne kuraĝos."

Himen Baŭ superruzis la artifikon de la edziĝo de la riverdio, kaj per tio peze batis la sklavmastrojn, kiuj intencis restaŭron, kaj ebenigis la vojon por legalizistoj en ilia praktiko de novaj politikoj. Poste sub lia gvido la loĝantoj de Je fosis 12 irigaciajn kanalojn por utiligi akvon de la inundema rivero.

*Ĉinaj naciecoj*

# La tataroj

de **ZONG MIN**

LA tatara nacieco kun pli ol 4,300 membroj estas unu el la malgrandaj naciecoj de nia lando. Ili loĝas plejparte en Jining, Taĉeng kaj Urumĉi de Hingiang kaj la ceteraj dise en la ĉefaj urboj de la suda parto de Hingiang.

En la oka jarcento la tataroj estis unu el la triboj sub la regado de la Turka Ĥana Regno. Post la pereo de tiu regno la tataroj fariĝis iom post iom potenca tribo. En la historio la tataroj formiĝis el kipĉak-a kaj mongola triboj en ilia longa kunvivado kaj estis ĉefaj loĝantoj de la Kazana Ĥana Regno en la 15-a jarcento. De post komenca periodo de la 19-a jarcento pro krizo de la servuta sistemo de la Cara Rusio, la rusaj feŭdaj servutul-mastroj intensigis sian rabadon de tero, tiel ke nombro da tataroj, kiuj loĝis en supra baseno de Volgo kaj la Centra Azio, komencis transloĝi al Hingiang de nia lando. En la lasta periodo de la 19-a jarcento, kun disvolviĝo de la komercado inter Rusio kaj Hingiang ankaŭ nemalmultaj tataraj komercistoj, profesiaj religiuloj kaj intelektuloj de Kazano venis al Hingiang.

Antaŭ la Liberiĝo granda parto de la tataroj kiuj loĝas en urboj de norda Hingiang sin okupis pri komercado. Kun disvolviĝo de ekstera komercado de Hingiang la tatara komercistaro rimarkinde dividiĝis en klasojn. Malmultaj grandaj komercaj kapitalistoj havis rektan rilaton kun eksterlandaj komercaj kapitaloj. Ili ne nur havis firmojn en diversaj lokoj de Hingiang, sed ankaŭ fondis filiojn en grandaj urboj de landinterno kaj akiris superprofiton per negocoj de brutoj, peltoj, lano, arĝento, kotono, kotonŝtofo, teo, silkaĵoj k.a. Iuj el ili eĉ starigis aldone diversajn prilaborejojn kaj sin okupis ankaŭ pri brutobredado por ekspluati malkarajn laborfortojn de laboristoj kaj paŝtistoj. Sub premado de la grandaj komercaj kapitalistoj relative granda nombro da mezaj kaj malgrandaj komercistoj iom post iom dronis en malprofito kaj bankroto. Inter la tataroj malmultaj homoj, plejparte malriĉaj paŝtistoj, sin okupis pri brutobredado. Ili havis nur malmultajn brutojn, kiuj ne sufiĉis por ilin vivteni, kaj vivis tre mizere pro manko de paŝtejoj kaj furaĝo.

La Oktobra Revolucio konigis al la ĉina popolo Marksismon-Leninismon kaj multe kuraĝigis la tatarojn kaj aliajn naciecojn de Hingiang. Tataroj aktive partoprenis en ĉiuj revoluciaj bataloj de sia loko kaj ankaŭ kontribuis al la paca liberigo de Hingiang en 1949.

Post la Liberiĝo en Hingiang efektiviĝis nacia regiona aŭtonomeco kaj diversnaciecaj popolanoj fariĝis mastroj de la ŝtato. Kvankam la tataroj loĝas dise, tamen ili havas siajn reprezentantojn en diversnivelaj popolaj kongresoj kaj regpotencaj organoj de la ŝtato en siaj respektivaj loĝlokoj. Dank' al serio da demokratiaj kaj socialismaj reformoj rapide multiĝis la nombro de kadroj el tataroj kaj la malriĉaj paŝtistoj kaj metiistoj sin liberigis de feŭdaj ekspluatado kaj subpremado kaj iuj el ili membriĝis al la laboristaro.

Relative frue disvolviĝis la kultura kaj eduka aferoj de la tatara nacieco kaj relative multaj estas ĝiaj intelektuloj. La Jining-a Tatara Lernejo fondita en 1941 estas unu el la plej fruaj nacimalplimultaj lernejoj en Hingiang. Tiutempe ĝi ludis aktivan rolon en reformo de la malnova religia edukado kaj en propagando de sciencaj scioj kaj kulturo. Post la Liberiĝo, sub la direktado de la proletara eduka linio de

*Tataraj studentinoj*






# Ĉina Esperanto-Delegacio vizitis Vjetnamion

Laŭ invito de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio la Ĉina Esperanto-Delegacio estrata de Ĉen Juan, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, faris amikan vizitadon al Vjetnamio de la 21-a de oktobro ĝis la 4-a de novembro, 1975.

Dum la vizitado, Xuan Thuy, sekretario de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio, Nguyen Van Kinh, prezidanto de VPEA, Nguyen Duc Quy, vicprezidanto de VPEA, kaj Dang Thai Mai, vicprezidanto de la Vjetnama-Ĉina Amikeca Asocio respektive akceptis la membrojn de la ĉina delegacio. La delegacio respektoplene pririgardis la maŭzoleon de Prezidanto Ho Chi Minh kaj vizitis fabrikojn, agrikulturajn kooperativojn k.a. en Hanojo, Hajfongo, Thai Nguyen kaj Ninh Binh.

Kiam la delegacio alvenis kaj forlasis Hanojon, la vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de VPEA Nguyen Duc Quy kaj Dao Anh Kha kaj konsilanto de la ĉina ambasadorejo en Vjetnamio Vang Gin ĝin bonvenigis kaj adiaŭis sur la aerodromo.

# Novzelanda esperantistino vizitis Ĉinion

Kiel membro de la Virina Delegacio de la Novzelanda-Ĉina Amikeca Asocio novzelanda esperantistino fraŭlino Enid G. Ockenden vizitis Ĉinion je la 5-a de novembro, 1975

F-ino E. G. Ockenden unuafoje vizitis Ĉinion en majo de 1974, kaj post reveno al sia lando ŝi faris paroladojn kaj skribis artikolon pri Ĉinio. Ŝi diris, ke ŝi tre ĝojas, ke ŝi denove havas ŝancon por viziti Ĉinion kaj rigardi ĉinajn aferojn, kiujn ŝi ne vidis lastfoje. Kune kun aliaj novzelandaj amikoj ŝi vizitis hospitalon, lernejon, loĝkvartalon k. a. en Pekino kaj poste vizitis la urbojn Hi-an, Ĝengĝoŭ, Ĉangŝa kaj Gujlin.

F-ino Ockenden vizitis en Pekino ankaŭ la redakcion de *El Popola Ĉinio* kaj intervidiĝis kun ĝiaj laborantoj.

---

la Partio rapide disvolviĝis la kultura kaj eduka aferoj de la tataroj kaj multaj tataraj intelektuloj ekokupis sin pri edukado kaj kontribuis al plifortigo de la eduka afero de Hingiang.

La tataroj kredas je islamo. En la loĝdomoj de la tataroj en urboj estas ferplataj kamenoj por varmigi la ĉambrojn. Rilate al iliaj manĝaĵoj, krom la fame konata manprena rizaĵo, estas ankaŭ kuko el kazeo, sekaj abrikotoj, rizaĵo kaj viando, la manĝaĵo kun aparta gusto de la tataroj. Biero farita el mielo estas plej ŝatata trinkaĵo de la tataroj.

La kultura vivo de la tataroj estas tre riĉa kaj varia. Ĝia nacia muziko kun hela takto plenas de stepa etoso. En festoj la tataroj ofte okazigas amasan dancan konkurson. Ankaŭ la teatra arto de la tataroj disvolviĝis relative frue. En la komenco de la tridekaj jaroj jam fondiĝis teatra trupo de la tataroj kiu prezentis programerojn kiuj malkaŝis la obskuron de la malnova socio kaj montras la revolucian spiriton de la tataroj en batalo kontraŭ la reakcia reganta klaso.

## Inter Ni

Karaj legantoj:

Venas 1976. Akceptu niajn plej sincerajn bondezirojn je la komenco de la nova jaro! Ni dankas vin pro viaj varmaj subteno kaj helpo al EPĈ en la lasta jaro.

Ĉijare, ni daŭre plibonigos nian laboron laŭ viaj valoraj proponoj.

Kiel sinteza esperanta gazeto, ĉijare EPĈ vivece kaj konkrete raportos al vi pri la nova Ĉinio en multaj flankoj, por pli bone helpi fremdlandajn geamikojn per Esperanto koni nian landon kaj profundigi la amikecon inter ni.

Multaj legantoj skribis, ke plaĉas al ili la rubrikoj "Amikeco", "Ĉinaj Naciecoj" kaj "Kurantaj Aferoj" de EPĈ. Ni klopodos por ilin plibonigi. En tiu ĉi numero vi certe rimarkos novajn rubrikojn, kiuj estas aldonitaj laŭ la proponoj de multaj legantoj.

En la rubrikoj "Historiaj Rakontoj" kaj "Historiaj Kulturaĵoj" aperontaj en la neparaj n-roj, ni prezentos al vi famajn homojn kaj eventojn en la ĉina historio kaj valorajn historiajn kulturaĵojn eltegitajn en diversaj lokoj de Ĉinio.

La paraj numeroj enhavos la rubrikojn "Metiartaĵoj" kaj "Tra Ĉinio". La tradiciaj metiartaĵoj de Ĉinio estas tre multspecaj kaj ŝatataj de fremdlandaj geamikoj. Ilin prezentos la rubriko "Metiartaĵoj" kaj koloraj bildoj sur la interna paĝo de la dorskovrilo. La rubriko "Tra Ĉinio" prezentos al vi pejzaĝojn de diversaj lokoj de Ĉinio kaj ŝanĝiĝojn de la natura fizionomio post la reformado de la ĉina popolo.

La rubrikoj "Inter Ni" kaj "Esperanta Angulo" daŭre aperos. En la antaŭa ni respondos demandojn interesajn por la legantoj, kaj en la lasta ni raportos pri esperantaj aktivadoj.

Karaj legantoj, ni esperas, ke vi ĝustatempe sciigos al ni viajn opiniojn pri ĉijara EPĈ por ke ni povu plibonigi nian laboron de tempo al tempo. Ni kredas, ke dank' al via zorgo kaj helpo ni certe povos sukcesi en tio.

La Red.

## Kurantaj Aferoj

### NOVA FLORO EN METIARTA KREADO

Por festi la 40-an datrevenon de la venko de la Longa Marŝo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo, la laboristoj de la Fugian-a Skulptejo sukcese kreis ŝtonan skulptaĵon "La Longa Marŝo". Ĝi prezentas la ĉefajn scenojn de la Longa Marŝo per artrimedo, en kiu kombiniĝas revolucia realismo kaj revolucia romantismo.

La tuta skulptaĵo konsistas el la scenoj de "Zunji", "Transpaso de Ginŝa-rivero", "Konkero de la Ponto Luding", "Transgrimpo de la Neĝaj Montoj", "Trarompo de Lazikoŭ" kaj "Jan-an". La tuta skulptaĵo longas 367 cm., larĝas 20 cm. kaj altas 54 cm. En la parto de "Zunji", la artistoj utiligante la naturajn kolorojn de la ŝtono, detale skulptis la grandiozan kunvenejon de Zunji-konferenco, super kiu flirtas ruĝa flago kaj antaŭ kiu staras bravaj gardistoj, kun montoj kaj arbaroj en la ĉirkaŭaĵo kiel fono. Proksime al la kunvenejo, ruĝarmeanoj kaj militaj ĉevaloj pretas por ekmarŝo. La sceno montras, ke la Ruĝa Armeo kun alta batalspirito komencos novan militiron, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, tuj post la venko de la revolucia linio de la lasta super la oportunisma linio de Vang Ming en la konferenco. En "Transgrimpo de la Neĝaj Montoj" ĉefe elreliefiĝas la heroisma eltenemo de la batalantoj kaj komandantoj de la Ruĝa Armeo, kiun ili montris dum transpaso de la pinto de Giagin-monto, kiun tutjare kovras neĝa tavolo. En la skulptaĵo, la blanka koloro de la ŝtono estas uzita por prezenti la neĝon kaj la ruĝa kaj la flava por prezenti la flagojn kaj la trupojn respektive. La vasta blanko kontrastas kun la longa fluo da marŝantoj inter kiuj brilas ruĝaj flagoj, kaj la tuta etoso estas plena de entuziasmo. La sceno de "Jan-an" kun la majesta monto de Pagodo kaj la rivero Janhe ruliĝanta montras la printempan pejzaĝon de jujubarbaro kaj loĝkavernoj, spegulante ke la tuta Partio kaj la tuta armeo jam venis al Jan-an por komenci la rezistan militon kontraŭ la japana agreso sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ.

### FORMIĜO DE DISAŬDIGA RETO EN NIA KAMPARO

En nia kamparo formiĝis disaŭdiga reto per megafonoj, kiu ampleksas la tutan kamparon el sennombraj vilaĝoj. 92.7% el la produktaj taĉmentoj de la lando estas envolvitaj en la reto kaj 70% de la kamparanaj familioj havas sian megafoneton ligitan kun ĝi. La totala

nombro de megafono en la kamparo superis 106 milionojn. Ĝi estas 13.5-oblo de tiu en la jaro 1965 antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio. Tiu disaŭdiga reto ludas ĉiam pli gravan rolon en la antaŭenpuŝo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado en la kamparo kaj en la firmigo de la diktaturo de la proletaro en nia lando.

## NIA RARATERA INDUSTRIO EN RAPIDA DISVOLVIĜO

Niaj raratera industrio fondiĝis post la Liberiĝo kaj ĉiam plifortiĝas. Nun la specoj kaj normoj de ĝiaj produktoj estas preskaŭ kompletaj.

En la lastaj dek jaroj, oni uzis rarateroj̃n por produkti multajn novajn specojn de ŝtalo, inter kiuj iuj estas jam ekzamenitaj de la ŝtato kaj fabrike produktataj kaj aliaj jam sukcese faritaj en provado. La rarateraj produktaĵoj fabrikitaj de nia lando mem estas vaste uzataj kiel materialoj en polurado de vitro, en lasero, en elektroniko, en lumprodukto, en produkto de raratera daŭra magneto kaj raratera vitro kun specialaj optikaj kvalitoj. En porcelana industrio estas uzata raratero enhavanta prazeodiman flavon por produkti belajn porcelanaĵojn. Kun la disvolvo de nia petrola industrio raratero estas ankaŭ uzata en petrola kemiindustrio.

La produkta tekniko de nia raratera industrio multe progresis en la lasta tempo, kaj iuj teknologiaj procedaroj, kreitaj laŭ la karakterizaĵoj de niaj riĉfontoj, nekomplikaj kun mallonga teknologia ĉeno kaj alta produktopocento de raratero taŭgaj por grandaskala produktado.

La fontoj de raratero de nia lando estas tre riĉaj kun rezervokvanto plej granda nun konata tra la mondo. La plena utiligo de tiuj fontoj havas gravan signifon por disvolvi nian nacian ekonomion.

## KARBOMINA REGIONO DE BAŬDING

En la sudokcidenta parto de nia lando estas konstruita nova bazo de karbo en Baŭding, Siĉuan.

La karbo kuŝanta tie sub la tero etendiĝas cent liojn. Nun estas jam konstruitaj sep paroj da ŝaktoj kaj ses fabrikoj por produkti konstrumaterialojn, lavi karbon, ripari maŝinojn ktp. La funkcio de tiu karbominejo havas gravan signifon por ŝanĝi la dislokiĝon de la karbominejoj en nia lando kaj akceli la disvolvadon de la ekonomio en tiu landparto. En la lastaj jaroj, la minejo jam provizadis tieajn fabrikajn kaj minajn entreprenojn per granda kvanto da karbo.

## BALAA ELEKTRONIKA MIKROSKOPO KUN ALTA DISTINGA POVO

Sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la laboristoj, teknikistoj kaj sciencistoj de la Pekina Fabriko de Sciencaj Instrumentoj sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, disvolvante spiriton de memstareco kaj sinapogo sur la propraj fortoj, sukcesis mem projekti kaj konstrui balaan elektronikan mikroskopon kun alta distinga povo el enlande produktitaj materialoj. La kvalito de la mikroskopo estas konstatita kontentiga kun distinga povo por 100 Å, kontinue reguligebla pligrandiga kapablo de 20-oblo ĝis centmiloblo kaj kompare forta sentigo de reliefo de la bildo. Ĝi estas nun jam produktata pokvante.

## KONCERTOJ MEMORE AL NIE ER KAJ HIAN HINGHAJ


Lastatempe oni aranĝis en Pekino kaj Ŝanhajo koncertojn memore al la popolaj muzikistoj Nie Er kaj Hian Hinghaj, en kiuj estis plenu mataj la kantoj "Granda Voĵo", "Adiaŭa Kanto post Finstudo en Lernejo", "Kanto de Portistoj" k.a. de Nie Er kaj fragmentoj el la "Ĥoro de la Flava Rivero", kaj "Ĥoro de Produktado", "Al la Postfronto de la Malamiko" kaj aliaj muzikaĵoj de Hian Hinghaj. Ambaŭ Nie Er kaj Hian Hinghaj estis pioniroj de revolucia muziko de la ĉina proletaro kaj membroj de la Komunista Partio de Ĉinio. Nie Er, komponisto de la nacia himno de Ĉinio, naskiĝis en 1912 kaj mortis en 1935. Li dediĉis sian mallongan vivon al revolucia muziko kaj komponis pli ol 30 kantojn, kiuj esprimis la koran senton de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, grave kontribuis al la tiama nacia movado kontraŭ japana imperiismo. Hian Hinghaj naskiĝis en 1905 kaj mortis en 1945. En la fruaj jaroj li sin ĵetis en la torenton de la nacisava movado kaj venis al Jan-an en 1938, kaj tie li verkis multajn elstarajn muzikaĵojn, inter kiuj estas ankaŭ la du ĥoroj supre nomitaj. En 1945 li verkis kun granda fervoro sian lastan muzikaĵon la "Ĉinan Rapsodion", en kiun li enverŝis sian tutan patriotisman senton.

La muzikaj verkoj kreitaj de ambaŭ komponistoj en grandaj revoluciaj bataloj heredis kaj disvolvis la tradicion de la ĉina nacia muziko kun forta batala karaktero kaj estas ŝate aprecataj de la ĉina popolo. Ili siatempe multe stimulis la varman patriotismon de la popolamasoj kaj ankaŭ nun akcelas la ĉinan popolon al heroa batalo por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj kontraŭ imperiismo kaj hegemoniismo.


La muzikaĵoj plenaj de revolucia emocio de la du muzikistoj estis varme akceptataj de la aŭskultantoj dum la prezentado.

# Pentristeto

de **GUO LIANG**



# Novaj fruktoj de teknikaj renovigoj de ŝanhajaj industrioj





La movforta laborejo de la Ŝanhaja Insekticida Fabriko starigis per pli ol 80 ilmaŝinoj 130-metran aŭtomatan laborlinion de dizela cilindro.



Ŝanhajaj laboristoj funkciigas ganto-trikmaŝinojn per komputero, kio liberigis laboristojn de mana manipulado kaj altigis la produktivon je 29-oblo.


La laboristoj de la unua laborejo de la Ŝanhaja Dua Ŝtala Fabriko faris plurajn gravajn teknikajn renovigojn, kaj per tio stimulis la produktadon. Jen aŭtomata laminatado de ŝtalaj materialoj






La Ŝanhaja Dua Ilmaŝina Fabriko lastatempe elfaris horizontalan cifere regatan plurprocedan alezan-frezan maŝinon, kiu estas facile manipulebla, havas striktan strukturon kaj povas prilabori grandajn maŝinpecojn.





La Ŝanhaja Unua Fridigila Fabriko sukcese faris grandan nesimetrian amoniakan ŝraŭban fridigilon, kiu havas avantaĝojn de malgrandeco, alta efiko, simpla strukturo kaj longa uzado.



Sciencaj laborantoj observas plantidojn de maizo, tritiko kaj rizo elkulturitajn per la procedo de polena monoploida selektado.

# Nova tekniko de kulturo de nova specio de rizo


La polena monoploida selektado de novaj specioj estas nova tekniko aperinta en la lastaj jaroj. La monoploidaj plantoj, kiuj havas en sia genera ĉelo nur unu serion da kromosomoj, partenogenezas sen fekundigo. Tial plantoj post natura aŭ arta duobligo de la kromosomoj fariĝas homozigotecaj diploidaj plantoj. La heredaj karakteroj de tiaj

Sciencistoj kaj kamparanoj kune preparas simplan kulturan bazon de polena selektado, kio kreis kondiĉojn por disvastigi polenan selektadon.





rizplantoj elkulturitaj per la nomita selektado
as fortikajn tigojn kaj pezajn spikojn.




Niaj sciencistoj sukcese faris altefikan kulturan bazon "nitrogeno 6". La vivaj pocentoj de polenaj plantoj en tia bazo estas pluroblo de tiuj en kutime uzata bazo.

ıntoj estas sufiĉe stabilaj kaj ties bonaj karakteroj vas superi tiujn de la gepatroj. Cetere per tiu ɛtodo oni povas multe redukti la tempon bezonaı por elkulturi novan specion kompare kun la tina metodo, kiu bezonas 7-8 jarojn. La polena onoploida selektado bezonas nur 3-4 jarojn por ɛevi novan specion kaj ĝia procedaro estas pli simpla kun pli alta selekta efikeco. Ĝi do estas bona metodo por elkulturi novajn speciojn. Oni jam elkulturis per tiu metodo novajn speciojn de rizo, kiuj donis, kiel kelkjara provado montris, riĉan rikolton.

Kamparano de Hajdian-komunumo de Pekino prezentas al vizitantoj sperton pri kulturado de rizplantoj per la procedo de polena monoploida selektado.



# Agronomia Instituto de Kamparanoj



Membroj de la agronomia instituto serioze lernas la teorion de la proletara diktaturo.



Iu brigada agronomia grupo de An-gju-komunumo kulturas bonspecion de kotonplantoj per selektado kaj artefarita seksa hibridigo kaj atingis ĝojindan sukceson. Jen membroj de la grupo kolektas polenon de kotonplantoj.

Agronomia grupo de Donghan-brigado de Ĉengguan - komunumo aktive kulturas bonspecian tritikon. Jen ĝiaj membroj ekspertizas nove kulturitan specion de tritiko.




Membroj de agronomia grupo el komunumanoj, kadroj kaj teknikistoj observas kreskadon de kotonplantoj en la eksperimenta kampo.




En la gubernio Kjuvo de Ŝanhi-provinco troviĝas agronomia instituto en kiu esploras kamparanoj kun riĉa sperto de produkta praktiko. Iliaj studobjektoj estas difinitaj laŭ lokaj bezonoj en produktado kaj servas al la agrikultura produktado. En ordinara tempo ĝiaj membroj partoprenas en produktado kaj faras esplorojn en sia brigado. Se estas bezone, ili do venas kune por interŝanĝi sperton aŭ esplori iun temon. Tiu novtipa agronomia instituto vigligis la amasajn agronomiajn aktivadojn en la tuta gubernio.

# Elterigitaj objektoj en Turfan de Hingiang



Laborantaj homfiguroj de Tang-dinastio (618-907 p.K.)

Brokato kun desegnoj de paraj ŝafoj kaj arboj de la Nordaj Dinastioj (386-581 p.K.)





Virino en ludo de goo (sur-silka pentrajo de Tang-dinastio)

12859



BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL